der esperantist

Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund e. V.

26. Jahrgang | Nr. 160 (2/1990) | ISSN 001 4-0619 | 30 Pf

Mesaĝo de la Prezidanto de UEA

Novaj ŝancoj, nova inspiro

Kun la nova jaro 1990 ni eniras ankaŭ novan jardekon. Kiujn novajn eblecojn prezentos la 90-aj jaroj al la tutmonda Esperanto-movado, kaj al UEA specife? En Brajtono UEA elektis novan Estraron — efektive multe pli novan, ol kutime en la lastaj jaroj. Se tio povus doni la impreson de granda renverso, valoras emfazi, ke tiel tute ne estis. Miaj rilatoj kun mia antaŭulo Humphrey Tonkin estas bonegaj, same kun la antaŭa Estraro. Kaj la diversaj novaj estraranoj, kvankam en la komenco pluraj apenaŭ konis unu la alian, jam bone kaj harmonie kunlaboras.

Mi forte esperas, ke tiu harmonio karakterizos en la nova jardeko ankaŭ la tutan Asocion kaj la tutan movadon. Kiel estrarano en la periodo 1971 — 74 (por multaj el niaj membroj jam parto preskaŭ de la fora historio de la movado!), mi ankoraŭ nun forte bedaŭras la malnoblajn atakojn kaj kalumniojn, kiuj tiam tumultis ĉie tra la movado, interalie kontraŭ la persono de prof. Ivo Lapenna. Mi mem ne partoprenis en ili. De tiam mi estas konvinkita, ke ni devas strebi antaŭ ĉio al harmonia kaj paca kunlaborado interne de la movado, kiel antaŭkondiĉo por nia celado disvastigi la scion kaj utiligadon de Esperanto kaj tiel kontribui al la edukado por internacia interkompreniĝo. Nun, kiel prezidanto, mi faros ĉion eblan por certigi, ke tiel estos.

Kaj la novaj eblecoj antaŭ ni? Dum la lastaj monatoj ŝanĝiĝis la tuta politika aspekto de orienta Eŭropo. Unu landon post alia inundis ondo da ŝanĝo kaj liberiĝo; kaj tio havas grandan signifon ankaŭ por la Esperanto-movado. Nun la germanoj de ambaŭ ŝtaoj povas vojaĝi libere en la alian ŝtaton. Same la aŭstroj kaj la ĉeĥoslovakoj. Preskaŭ ĉie en Eŭropo ne plu ekzistas la grandaj baroj al libera esprimado kaj libera organiziĝado, kiuj pli frue bremsis la komunikadon. Ni povas esperi, ke en la estonteco malaperos ankaŭ la financaj kaj transpagaj baroj inter la „soclandoj" kaj la cetera mondo.

Se la renaskiĝinta orienta Eŭropo povos alporti al UEA inspiron de freŝa kaj nova idealismo, kaj se UEA scios profiti de la novaj kondiĉoj, tio aŭguros brile por la evoluo de Esperanto en la nova jardeko. Tamen, la eventoj de Eŭropo ne kaŭzu, ke la Eŭropanoj forgesu pri la cetera mondo! Ankaŭ la venonta Universala Kongreso en Kubo helpos montri la kreskantan tutmondecon de Esperanto.

Saluton al la naŭdekaj! Feliĉon kaj vervon en la nova jaro deziras al vi ĉiuj

John Wells

Ĉu ni ne havis strategion?

En „Saksa Kuriero" 1/1990 (n-ro 87) laŭ la artikolo „Esperanto en la nuna politika situacio de GDR" Michael Lennartz i. a. opinias,

1. ke la Centra Estraro (CE) de GDREA antaŭ la ŝanĝoj en GDR ne estis gvidorgano,
2. ke la kunsidoj estas tro longaj,
3. ke la CE „ĝis nun neniam ellaboris kaj realigis strategiajn konceptojn" ktp.

Nu, estas nuntempe modo, dubindigi ĉion ajn, kio estis farita dum la pasinteco.
Mi ne partoprenas tiun modon, aparte ne, se temas pri la agado de GDREA kaj ties Centra Estraro. Jen mia komento:

1. Sendube la CE ja estis en alta grado gvidorgano. Sed ĝi ne estis komando-centralo. Al la stilo de CE apartenis demokrata pensinterŝanĝo pri la irota vojo. La gvidorgano de la asocio tamen nur povis gvidi surbaze de la libervola preteco flanke de la distriktaj estraroj kaj grupoj. Eĉ tiu stilo al iuj hodiaŭ ŝajnis „ordonado".

2. Dum la jaroj 1965 — 1970 la antaŭulo de CE, la Centra Laborrondo Esperanto, ĝenerale nur havis kelkhorajn kunsidojn en Berlin. La kunsidoj komenciĝis je la 11-a horo, kaj je la 14.30 h la unuaj jam ekkuris por atingi siajn trajnojn en la sudon aŭ nordon de GDR.
La enkonduko de kunsidoj (alveturo vespere de la antaŭa tago, forveturo matene de la postkunsida tago) ebligis pli trankvilan trakton de esencaj problemoj de strategio, doni informojn, aŭskulti raportojn, eĉ foje inviti reprezentantojn de alilandaj partneraj asocioj.
Por engaĝita esperantisto tiaj kunsidoj ja povas esti toleritaj. Eble pro monmanko estonte ni devas reveni al la forpasinta principo de nur kelkhoraj kunsidoj en Berlin. Tiam oni krios, ke ne sufiĉos la tempo, por trakti strategiajn demandojn de la Asocio.

3. En kio konsistis strategio de GDREA?

3.1. Ekde 1965 necesis liberigi Esperanton de la stalinisma misfido kaj misinterpreto kaj reagnoskigi la ideon de internacia lingvo ĝenerale kaj aparte de Esperanto en la intelektula kaj politika gvidsferoj de GDR. Tio principe sukcesis, ne laste pro tre sistema agado en sciencaj rondoj (kie mondvaste la antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto estas tre fortaj) kaj en rondoj de la politikaj gvidinstancoj.
3.2. Tiu ŝanĝo de la sinteno al Esperanto helpis enkonduki unu komponenton de la agado post la alia: kreo de diversaj lerneblecoj (laste eĉ en altlernejoj), publikigo de fakaj kaj sciencaj materialoj, lanĉo de nova scienca disciplino en GDR (interlingvistiko), ekpartopreno en la internacia Esperanto-movado (se ankaŭ nur limigite), faro de amikecaj rilatoj al landaj asocioj (se ankaŭ nur tro limigite al orienteŭropaj landoj), certa kontribuado en la fakaplika sfero, internaciaj aranĝoj en GDR, pli kaj pli memstare aganta junulara movado ene de GDREA, progresoj en la amasmedioj, kontaktado de neesperantistaj sociaj partneroj, evoluigo de la teknikaj kaj materiaj kondiĉoj k. s.
Kompreneble nian agadon limigis la kadroj, kiujn donis la ŝtata sistemo. Laŭ Lennartz tio verŝajne ne estas strategio sed nur blinda hazardismo. Nu **bone.**

Kaj hodiaŭ? La ŝanĝiĝintaj cirkonstancoj en GDR donas i. a. jenajn novajn ŝancojn:

1. Plievoluigo kaj elformado de la menciitaj komponentoj, aparte pli internacia agado kaj aplikado de Esperanto

2. Lingvopolitika prezento de Esperanto kiel solvo de la lingva problemo de la socio. La lingvopolitikaj tabuoj en GDR falis. Ne pli eblas vidi en Esperanto nedeziritan konkurencon kontraŭ la rusa . . .

3. Partopreno en la strebadoj por eŭropa lingvopolitiko (koncepto de la Eŭropa Domo).
Cetere, iam Universala Kongreso demandis per sia ĉeftemo „Kion konservi,

Traktado pri kunlaboro GEA-GDREA

La grandegaj ŝanĝoj en orienta Eŭropo, aparte ankaŭ en GDR, ebligas kaj eĉ necesigas tute novajn eblecojn de kunlaboro kun Esperanto-organizaĵoj en okcidenta Eŭropo. Aparte grava estas la intensigado de la rilatoj inter GEA kaj GDREA. Kvankam ja ekzistas jam unu komuna lingvo (la germana) kaj Esperanto ne bezonatas por interrilati, tamen la kunlaboro estas ebla kaj dezirinda. Ambaŭ asocioj disponas pri konsiderinda potencialo, same pri diferencoj kaj diversspecaj spertoj. La kunigado de tiuj kapabloj kaj spertoj en difinitaj kampoj de la internacia esperantista agado ne nur utlus al ambaŭ asocioj sed al la tutmonda Esperanto-movado. Pro tio la 4-an de marto 1990 GDREA invitis al sia sidejo reprezentantojn de la Prezidio de Germana Esperanto Asocio. Partoprenis la tre utilan, sinceran kaj aferecan kunsidon flanke de GEA la membro de la prezidio **d-ro Rudolf Fischer,** plue **Hedwig Fischer, Ina Tautorat** (prezidantino de la Okcidentberlina Esperanto- Ligo) kaj **Ronald Schnell** (sekretario de la Ligo). Flanke de la prezidio de GDREA partoprenis la prezidanto **d-ro Ronald Lötzsch,** la vicprezidanto **Manfred Arnold,** la sekretario **d-ro Detlev Blanke** kaj la prezidianoj **Ulrich Becker** kaj **Detlev Kraus.** La 4-hora informinterŝanĝo grave kontribuis al pli bona scio kaj kompreno pri la koncernaj asocioj. Ne ekzistas iuj ajn konfliktoj inter GEA kaj GDREA, sed nur sincera volo al kunlaboro. Estas antaŭviditaj i. a. interŝanĝoj de plej gravaj kontaktadresoj, reciproka partopreno en la tutlandaj aranĝoj (68-a Germana Esperanto-Kongreso en Freiburg kaj Centra Renkontiĝo de GDREA en Brandenburg), plifaciligo de ĉiuspecaj individuaj, grupaj kaj estraraj kontaktoj, interŝanĝo de materialoj k. s. Oni ankaŭ planas iom pli grandan renkontiĝon de prezidianoj kaj aktivuloj de ambaŭ asocioj.

68-a Kongreso de Germana Esperanta Asocio

Ĝi okazos de la 1-a ĝis 4-a de junio 1990 en Freiburg. La temo: „Ekologio ne konas limojn." Por GDR-anoj ekzistas aparte malmultkostaj tranoktebleĉoj. Informojn petu ĉe Konrad Gramelspacher, Rimsinger Str. 13, D-7812-Bad Krozingen 4.

Gratulon al Rudolf Burmeister

Al la pejzaĝo de GDREA apartenas kiel konstanta kaj iom bunta arbo Rudolf Burmeister el Karl-Marx-Stadt, prezidanto de la Distrikta Estraro kaj membro de la CE de GDREA. Li nun ĵus festis sian 60-an naskiĝtagon (19. 5. 1990), kvankam -ŝajne- antaŭ nelonge li eble apartenis al la Junulara Komisiono. Tamen, evidente, eĉ nia plej eminenta esperanta filatelisto, fiŝkaptisto kaj alikapablulo jam „venas en la jarojn". Pro la multegaj kontribuoj, kiun Rudi donis al Esperanto ni dankas al li. Kaj pro la vivojubileo ni elkore gratulas dezirante bonfarton, ne lamiĝontan humuron kaj ankaŭ estonte kelkajn verdajn atingojn ... via Centra Estraro de GDREA.

Grava perdo por UEA

Tute neatendite, la 16-an de marto 1990 forpais post pulmito la direktoro de la Centra Oficejo de UEA, Neil Salvesen el Britio. Neil estis tre multflanka homo, i. a. eldoninto de serio de literaturaĵoj. La movado perdis kleran kaj kunlaboreman kapablulon. GDREA sincere kondolencas al la familianoj kaj UEA.

Nova eldono

Meze de la jaro aperos la 5-a eldono de la lernolibro de Dahlenburg/Liebig, laŭ Vorankündigungsdienst des Buchhandels, N-ro 10, n-ro 5766114. Do mendu!

Resto de p. 26

kion ŝanĝi?". Mi scias multon por konservi, kaj mi scias multon por ŝanĝi. Sed ĉio nur eblas surbaze de tute konkretaj sociaj kondiĉoj kaj eblecoj.
Kaj eble ni ne tute malbone uzis la eblecojn de la pasinteco.

Detlev Blanke

Pri esploroj de la historio de laborista Esperanto-movado farataj en GDR.

de Detlev Blanke

1. En la jaro 1965 finiĝis la unua etapo de la reorganizado de la Esperanto-movado en Germana Demokratia Respubliko. Fondiĝis Centra Laborrondo de Esperanto-amikoj en Germana Kulturligo (CLE). La dua etapo finiĝis en 1981, kiam en la kadro de la influhava kaj tre multflanka socia organizaĵo Kulturligo de GDR CLE transformiĝis en Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR (GDREA). Sen la aktiva partopreno de multaj iamaj membroj de Germana Laborista Esperantista Asocio (GLEA) la tiom sukcesa reorganiziĝo ne estus imagebla.
GLEA ekzistis de 1911 — 1933. En la unua gvidorgano de la movado en GDR (CLE) en 1965 de entute 11 membroj 8 estis iamaj membroj de GLEA (= 72,7 %), 1976 de 41 membroj 9 estis iamaj GLEA-anoj (22 %) kaj 1987, post la lastaj elektoj de la Centra Estraro de GDREA, el 52 membroj ankoraŭ nur 6 (11,5 %) apartenis siatempe al GLEA. La leĝoj de la vivo — jen nia dilemo.

2. Por la agado de la iama CLE kaj posta GDREA la historio de la laborista Esperanto-movado estis aparte interesa kaj grava. Kial?

a) En GDR kompreneble la historio de la laborista movado ĝuis tute principe grandan intereson kaj gravecon. La historio de GLEA estas tre interesa parto de la ĝenerala laboristomovada historio.

b) La historio de GLEA estis aparte dinamisma, verŝajne pli dinamisma ol la historio de la neŭtrala movado. Tio havis sian kaŭzon i. a. en la fakto, ke GLEA utiligis Esperanton por la servo de socipolitike engaĝitaj grupoj, tavoloj, partioj.

c) Kiel jam menciite, la veteranoj de GLEA faris tre saĝan kaj utilan laboron por la reorganizado de la Esperanto-movado en GDR post la venko super stalinismaj konceptoj. Tio ne signifas, ke aliaj esperantistoj, nealiĝintaj al GLEA, ne faris gravan laboron por la reorganizo. Sed oni povas aserti, ke la **decida** kontribuo venis de la laboristmovadaj veteranoj. Sekve la unua prezidanto de CLE fariĝis Rudi Graetz, eksdiplomato kaj iama tre aktiva membro de GLEA, aparte en la norda regiono de Germanio (Meklenburgo).

Ekde la fondiĝo de CLE oni tre klopodis esplori la historion de la laborista Esperanto-movado. Pro manko de sufiĉaj fortoj, oni preteratentis — beraŭrinde — aliajn komponentojn de la historio de la Esperanto-movado. Pri tio GDREA konscias kaj klopodas stimuli esplorojn pri la tuta kompleksa historio. Sed la plej multajn spertojn kaj atingojn GDREA povas montri pri la laboristmovada komponento. Pro tio nia temo, kiu eble el metodologia vidpunkto povus esti interesa ankaŭ por historiistoj direktitaj al aliaj temoj de la Esperanto-movado.

3. Kiujn metodojn oni aplikis por akiri materialon, prilabori kaj publikigi ĝin?

3.1. Unue gravis trovi la iamajn ankoraŭ aktivajn kaj kunlaborpretajn membrojn de GLEA. Artikoloj kaj alvokoj en „der esperantist", organo de CLE, poste de la Centra Estraro de GDREA, aktivecoj sur distrikta kaj subdistrikta ebenoj helpis trovi malmultajn.

3.2. Kelkaj el la plej kompetentaj veteranoj verkis artikolojn por „der esperantist". Tiel la temaro fariĝis konata. Aliaj iamaj aktivuloj sin reanoncis.

3.3. Kompreneble tre gravis kolekti kaj konservi la valoran materialon, pri kio multaj disponis resp. ankoraŭ disponas:

laboristmovadaj Esperanto-gazetoj, broŝuroj kaj libroj; flugfolioj, prospektoj, korespondaĵoj, programkajeroj, fotoj k. s. Bedaŭrinde tro ofte, post la morto de aktivulo, la familianoj sen-

zorge forĵetas historie tre valoran materialon. Iom da atento flanke de la centra kaj distriktaj estraroj povis ofte savi valorajojn, se ankaŭ ne ĉiufoje.

3.4. Tro ofte la morto de eminenta veteran(in)o memorigas, ke oni preterlasis unikan ŝancon: sonbende aŭ vidbende registri liajn/ŝiajn rememorojn. Ni tamen povis registri iom da materialoj, i. a. pri por GLEA gravaj veteranoj kiel Ludwig Schödl kaj Werner Habicht. De internacie konataj laboristaj esperantistoj ni same surbendigis intervjuojn, i. a. de S. N. Podkaminer kaj G. Demidjuk (ambaŭ Soveta Unio), N. Aleksiev, A. Grigorov, H. Gorov (el Bulgario) kaj Bill Keable (Britio). Sed atentu, vere interesajn rememorojn oni akiras nur, se oni zorge preparis intervjuon. Kaj por tion kapabli, oni jam devas koni sufiĉe bone la tutan temaron.

3.5. Kun malpli da sukceso oni atingis, ke kelkaj veteranoj verku dokumentitajn materialojn. Multe da materialo kolektis Ino Kolbe, Ludwig Schödl, Werner Habicht kaj Erich Würker. Tio estas ne tute facila. Rememoroj ne sufiĉas. Ili ofte estas suprajoj, parte eĉ eraroj. Ĉiam necesas kontroli ilin surbaze de seriozaj fontmaterialoj. Do gravas dokumentitaj materialoj.

3.6. La plej efika rimedo estis la regula okazigo de renkontiĝoj de iamaj membroj de GLEA. La unua okazis en la jaro 1978. En 1990 okazis la 12-a. Dum la jaroj la nombro de konataj GLEA-anoj kreskis. Tiel en la jaro 1989 ni havis ankoraŭ ĉ. 80, sed nur malpli ol la duono ankoraŭ povas partopreni la renkontiĝojn. Dum la GLEA-renkontiĝoj la veteranoj prezentis prelegojn, rememorojn, ekspoziciis materialojn, renkontiĝis kun historiistoj k. s.

Studoj kaj tezoj pri la historio, kiun la veteranoj mem travivis aŭ kunkreis, estis submetitaj al diskuto. Tio estas tre grava. Ĉiam ekzistas la danĝero, ke nur el parto de nekompletaj fontoj oni tro rapide konkludas pri iuj historiaj eventoj, trogravigas aŭ bagateligas ilin. Pri la renkontiĝoj regule aperis raportoj en „der esperantist".

3.7. La historian esploradon la Centra Estraro de GDREA (iama CLE) tute sisteme gvidis kaj stimulis. La temo ĉiam revenis post certa tempo al la tagordo de la plenkunsido, same sur distrikta ebeno (distriktaj estraroj). En la jaro 1974 eĉ okazis aparta kolokvo en Gotha pri Germanaj-Sovetiaj laboristmovadaj esperantistaj rilatoj ĝis 1933. Pri la rezultoj aperis broŝuro[1]). Ankaŭ en la kadro de internaciaj aranĝoj, okazintaj en GDR, la temo de la laboristmovadaj tradicioj estis atentata. Ekz. la tradicia Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo (IFER) en Leipzig, en la jaro 1986 estis dediĉita al la 75-jariĝo de GLEA. La kadra temo estis „Leipzig — urbo de la laborista Esperanto-movado"[2]). Unu el la jam iom famaj fakseminarioj, kiujn GDREA akozigis en Bad Saarow (pr. bat zaro) ĉe Berlin havis en la jaro 1986 la kadran temon „Historiaj kaj sociologiaj aspektoj de la Esperanto-movado"[3]).

3.8. Aparte gravis la fakto, ne nur savi la materialojn de la veteranoj mem, sed ankaŭ trarigardi la oficialajn ŝtatajn kaj partiajn arkivojn, kiuj ne malofte posedas tre valoran kaj dokumentan materialon, ekz. i. a. pri la persekutoj de laboristaj esperantistoj flanke de la germanaj faŝistoj post 1933.

3.9. Metodologie tre gravis la kunlaboro kun profesiaj historiistoj respektive kun kompetentuloj pri la laboristmovada historio, kiuj ne devis esti esperantistoj. Ili tre helpis enkadrigi la esperantistajn faktojn en la ĝeneralan historion. Cetere, ĝuste la manko de la enkadrigo de esperantomovadaj faktoj kaj procezoj en la ĝeneralan historian pejzaĝon de regiona, nacia aŭ eĉ monda skalo, estas grava manko de multaj historiaj studoj. La kunlaboro de veteranoj de GLEA kun historiistoj, i. a. resultigis broŝuron pri la historio de GLEA en unu regiono de iama meza Germanio, en Ercmontaro/Vogtlando[10]).

4. Pri kiuj ĝisnunaj rezultoj GDREA povus resumi?

4.1. Aperis kelkaj altlernejaj (universitataj) kaj faklernejaj ellaborajoj: Unu ŝtatekzamena disertacio (= diplomdisertacio aŭ magistra verko)[4]), unu faklerneja disertacio[5]), 2 sciencaj materialoj apartenantaj al la ekzamena sistemo por doktoriĝo[6]), almenaŭ 6 alispecaj materialoj de studentoj (seminariaj studoj). Bedaŭrinde ankoraŭ mankas doktorigaj disertacioj.

4.2. En la gvida (en GDR) esplorrevuo pri la historio de la laboristmovada historio aperis 2 ampleksaj studoj[7]), kiuj tiel oficiale konigis tre nekonatajn faktojn al la historiistoj kaj helpis favorigi la interfakulan atmoseron por similaj studoj.

4.3. Fojfoje la gazetaro publikigis materialojn. Artikolo pri la rolo de Esperanto en la hispana milito (certe iuj memoras la revuon „Popola Fronto"), kiu aperis en la gazeto „Neues Deutschland" (20./21. 9. 1986), atentigis la redaktoron de grava germana laboristmovada historia verko, eldonota en ŝtata eldonejo de GDR, pri eventuale taŭga verkanto de ĉapitro pri GLEA. La ĉapitro estas preta kaj akceptita por la libro[8]).

4.4. Tiu lastmenciita fakto estas tre grava: La temaro de historio de la laborista Esperanto-movado iom post iom eniris manlibrojn kaj aliajn historiajn librojn[9]).

4.5. Aparte gravaj estas regionaj studoj pri la historio de GLEA. Ĝis nun aperis unu pri la regiono de Ercmontaro-Vogtlando (hodiaŭ distrikto Karl-Marx-Stadt)[10]). Pri la regiono de orienta Saksio (hodiaŭ distrikto Leipzig) du broŝuroj estas en preparo, same pri la regiono Meklenburg (norda GDR).

4.6. En „der esperantist" kaj „Paco" aperis multaj materialoj kaj studoj.[11])

4.7. Kelkaj aparte interesaj ĉapitroj el la historio de la germana laborista Esperanto-movado ankaŭ aperis en antologioj, publikigitaj ekster GDR.[12])

5. Jen, skizoforme, kelkaj, paŝoj, problemoj kaj atingoj rilate la esploron de la germana laborista Esperanto-movado. Ŝajnas al ni, ke multo el la skribita metodologie estas aplikebla ankaŭ al alitemaj partoj de la esperanta historiografio.

6. Notoj.

1) Blanke, Detlev: Der Anteil der Arbeiter-Esperantisten bei der Entwicklung der deutsch-sowjetischen Freundschaft in der Zeit der Weimarer Republik. Erfurt: Kulturbund, 1974, 67 p.
(La kontribuo de la laboristaj esperantistoj por la evoluigo de la germana-soveta amikeco dum la tempo de la Respubliko de Weimar)

2) kp. „der esperantist" n-ro 137 (3/1986), p. 55 — 56

3) kp. „der esperantist", n-ro 142 (2/1987), p. 35 — 36

4) Becker, Diethelm: Der Arbeiter-Esperanto-Bund auf dem Weg zu einer revolutionären Organisation des deutschen Proletariats. Universitato Rostock, Historia Instituto, 1968, 62 p. (La Laborista Esperantista Asocio survoje al revolucia organizajo de la germana proletaro)

5) Schwingel, Karin: Die Arbeiter-Esperanto-Bewegung in Mecklenburg in der Zeit der Weimarer Republik. Institut für Lehrerbildung, Schwerin, 1985, 40 p. (La laborista Esperanto-movado en Mecklenburg dum la tempo de la Respubliko de Weimar).

6) De d-ro Detlev Blanke, Berlin (resumo de 1)) kaj d-rino Sabine Fiedler, Leipzig: Zur Arbeiter-Esperanto-Bewegung in Leipzig, Karl-Marx-Universität Leipzig (Sektion Fremdsprachen), Leipzig, 1985, 22 p. (Pri la laborista Esperanto-movado en Leipzig)

7) Blanke, Detlev: Über die Arbeiter-Esperantisten-Bewegung in der Zeit der Weimarer Republik und ihren Beitrag zur Entwicklung der deutsch-sowjetischen Freundschaft. En: Beiträge zur Geschichte der Arbeiterbewegung, Berlin, **18** (1976) 4, p. 683 — 690 (resumo de 1))
— Humberg, Felix: Arbeiter-Esperantisten in Thüringen. En: Beiträge zur Geschichte der Arbeiterbewegung, Berlin, **30** (1988) 6, p. 813 — 821. (Laboristaj esperantistoj en Turingio)

8) Temas pri manlibro pri organizajoj de la germana laborista movado, eldonota de Kurt Finker, aperonta en Dietz-Verlag Berlin 1991.

9) I. a. en „Geschichte der internationalen Arbeiterbewegung in Daten" (Historio de la internacia laborista movado en datoj) Berlin: Dietz-Verlag 1986 (868 p.) oni trovas artikolojn pri SAT (p. 208) kaj IPE (p. 292).
— en Groschopp, Horst: Zwischen Bierabend und Bildungsverein. Berlin: Dietz-Verlag 1985, (Inter biera vespero kaj kleriga societo) troviĝas ĉapitro „Esperantistoj kaj stenografoj" (p. 75 — 78)

10) Glier, Willi / Weißbach, Willi / Müller, Alfred / Conrad, Max: Zur Geschichte der Arbeiter-Esperanto-Bewegung im Bezirk Erzgebirge-Vogtland (1907 — 1933), Karl-Marx-

Stadt: Kulturbund, 1976, 40 p. (Pri la historio de la laborista Esperanto-movado en la distrikto Ercmontaro (Vogtlando)

11) En „der esperantist" n-roj 5/6; 16/17, 26/27, 32/33, 38/39, 46, 50, 61/62, 65/66, 78, 90, 96, 101, 108, 113/114, 120, 125, 129, 132, 133, 135, 136, krome en la GDR-numeroj de „Paco" inter 1966 — 1989 (ĉiujare unu 40-paĝa kajero)

12) — Pri la temo 1) kaj pri IPE du studoj de D. Blanke en la de li redaktita libro „Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado", Budapest: Hungara Esperanto-Asocio 1978 kaj 1986.

— Blanke, Detlev: La gazeto „Völkerspiegel". En: Čoliĉ, Senad (1988, Red.): Sociaj aspektoj de la Esperanto-movado. Sarajevo: Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, p. 59 — 63

— Blanke, Detlev: La historio de EKRELO. Aperonta en Haupenthal, Reinhard (Red.); La Iltis-libro, 1990.

Japana numero de „Paco"

Aperis la japana numero de „Paco" 1989. Abonantoj de „Paco" (kaj nur tiuj!) povas peti ekzempleron ĉe la Centra Oficejo de GDREA.

GDR-Paco havebla

Dezirantoj ricevos senpage malnovajn numerojn de la GDR-eldonoj de „Paco". Ili ĉiuj enhavas krom eksmodiĝintajn materialojn ankaŭ validajn fakajn kontribuojn kaj literaturaĵojn. Petu de GDREA!

Vojaĝimpresoj el Kubo

Pasintjare (1989) de la Junulara Estraro de GDREA mi ricevis la eblecon, vojaĝi al la ĉiam verda, sunplena kaj gastama Kubo. Je malvarma novembra vespero mi kune kun vojaĝgrupo de junaj turistoj enaviadiliĝis en Berlin-Schönefeld kaj post 11-hora flugo nin salutis la milda nokta venteto de la Karibo. Ĝenerale ni germanoj ja ne estas dorlotitaj de sunplenaj someroj kun konstanta varmo kaj pro tio ni kompreneble uzis ĉiun liberan momenton por naĝi kaj sunumi. Sed ni ankaŭ entreprenis ekskursojn al diversaj urboj. Ekzemple ni estis en la ĉefurbo Havano, en Matanzas, Santa Clara, Varadero, Morón, Trinidad kaj en Ciego de Avila. La vojaĝaentejo „Cubatur" por ni organizis eventoriĉan programon kaj ĉiu tago alportis novajn impresojn kaj aventurojn. Ĉiuloke ni rigardis interesajn vidindaĵojn: ekzemple krokodilan bredejon, ananasan plantejon, diversajn muzeojn kaj la ŝatatan drinkejon de Ernest Hemingway „La Bodeguita del Medio". Tie ĉiuj muroj estis plenaj de fotoj kaj surskriboj de Hemingway kaj de aliaj pli aŭ malpli famaĵ personoj. Kiel siatempe la verkisto ni kompreneble ankaŭ gustumis la faman kaj treege bongustan trinkaĵon nomitan „Mojito" kaj en iu angulo de la drinkejo certe ankoraŭ estas legeblaj niaj pli aŭ malpli spritaj skribaĵoj.

Grandioza aventuro por ni ĉiuj estis nia ĉevalrajdado tra la montaro „Lomas de Florencia" kaj la sekva refreŝiĝo en klara montara rivereto, ĉirkaŭita de altaj, palmkovritaj rokoj. Mi estis ege ravita de la sovaĝa, preskaŭ netuŝita naturo.

Kompreneble ni ankaŭ ĝuis la noktan vivon en Kubo, kiu estis ĉiuloke vigla kaj plena de kariba temperamento. Eĉ noktomeze la stratoj estis homplenaj, oni renkontiĝis por babili, aŭskulti muzikon aŭ simple por promenadi. Tro rapide pasis miaj tagoj en tiu bela kaj afabla lando kaj mi vere tre bedaŭris, ke nia grupo nur dum mallonga tempo restadis en la ĉirkaŭaĵo de Havano. Tamen mi por kelkaj horoj sukcesis liberiĝi de la grupo por viziti la oficejon de Kuba Esperanto Asocio. Mi tie informiĝis pri la du grandaj eventoj okazontaj ĉi-somere en Kubo: La Universala Kongreso de UEA kaj la Internacia Junulara Kongreso de TEJO. Samtempe mi eksciis, ke en Kubo jam ekzistas sufiĉe forta kaj aktiva esperantista movado kaj ĉefe inter la junularo kreskas la intereso por lerni la Internacian Lingvon. Al ĉiuj Kubaj geesperantistoj mi tutkore deziras bonan prosperon de la Esperanto-agado kaj grandan sukceson en la organizado de la UK kaj la IJK.

Cornelia Rau

ESPERANTO-FAKO POR EKSTERLANDANOJ EN LA UNIVERSITATO EÖTVÖS

1. **Internacia Koresponda Interlingvistika Fako** komenciĝos la unuan fojon en la studjaro 1990/91 (poste ĉiun trian jaron). La 3-jara postdiploma formado (entute 6 semestroj) intencas doni ĝeneral- kaj aplikat-lingvistikajn bazojn por la studado de internacia lingva komunikado, okupiĝas detale pri la problemoj de interlingvistiko kaj pri diversaj terenoj de esperantologio (priskriba gramatiko, literaturo, movadhistorio).
La bazaj studobjektoj koncentriĝas en la unuaj du jaroj, la tria jaro ebligos enprofundiĝon en elektitan fakon (esperanta gramatiko, esperanta literaturo, lingvopedagogio por instruistoj, ĵurnalistiko kaj redaktado, krome komputila lingvistiko laŭ la planoj).

Postuloj: supera-grada diplomo (almenaŭ „bachelor") kaj scio de Esperanto

Formo: orientiga vizito en septembro 1990, poste ĉ. po unusemajna restado en Budapeŝto dum semestrofinaj prelegoj, konsultiĝoj kaj ekzamenoj. Tiam la gestudentoj ricevas ankaŭ informojn kaj materialojn por la sekva semestro. Dum la semestro ili devas memstare labori surbaze de la disdonita temaro kaj plenumi skribajn taskojn.

Rezulto de la studoj: fine de la tria jaro finpretigo de faklaborajo aŭ disertacio kaj ŝtata (kompleksa) ekzameno. Depende de la origina diplomo kaj de la disertacio akiro de diplomo („master"-grado) aŭ de doktora grado (ties limdato estas plilongigebla).

Kotizo (laŭ semestroj): 300 dolaroj.

2. **Taga Esperanto-Fako ĉiujare**

La postdiploma 2-jara (kun bazgrada scio de Esperanto) aŭ 2,5-jara (sen scio de Esperanto) formado enkondukas la gestudentojn en diversajn terenojn de interlingvistiko kaj esperantologio (priskriba gramatiko, literaturo, movadhistorio, metodiko).
Postuloj: superagrada diplomo (almenaŭ „bachelor")
Formo: partopreno en la lecionoj de la ordinara taga Esperanto-fako (unuajare en ties 3-a jaro kaj duajare paralele en la 4-a kaj 5-a jaroj), plue kompletigaj studhoroj (ĝenerala lingvistiko, enkonduko en la hungarajn kulturon kaj lingvon). Por tiuj, kiuj ne scias Esperanton okazas intensa lingvoinstruado dum la unua semestro.
Rezulto de la studoj: fine de la dua jaro finpretigo de diplomlaborajo, ŝtata (kompleksa) ekzameno, akiro de diplomo („master"grado).
Kotizo: (laŭ semestroj): 1250 dolaroj

3. **Kompleta Universitata Formado en taga kurso ĉiujare**

5-jara superagrada formado (kombinite kun iu alia fako, partopreno en tagaj kursoj kaj lernado de la hungara lingvo)
Postuloj: abiturienta ekzameno
Rezulto de la studoj: fine de la 5-a jaro finpretigo de diplomlaborajo, ŝtata (kompleksa) ekzameno, akiro de diplomo („master"grado).
Kotizo (laŭ semestroj): 1250 dolaroj

Aliĝo: Eötvös Universitato, Rektori Hivatal Oktatási Osztálya Budapest, Szerb u. 21-23. I/28. H-1053 Hungario, ĝis la 30-a de majo.
(Ŝtatanoj de socialismaj landoj aliĝu por sia koncerna ministerio! Kotizoj laŭ specialaj kondiĉoj.)

„Fervojistaj Novaĵoj" — stabilas

ĵus aperis N-ro 33 de „Fervojistaj Novaĵoj", eldonita jam la 12-an jaron de la Fervojista Fakgrupo ĉe GDREA.
Kiel kutime la kajero estas tre lerte redaktita. Ĝi enhavas la lastajn terminojn de la fervojfaka termino-listo Esperanto-Kodo-germana, entute 4166. En la sama kajero aperis la unua parto de la dua listo: Germana-Kodo.

Kandidatiga disertacio pri interlingvistika temo en ĈSSR

La nombro de altlernejaj kaj akademiaj laborajoj pri interlingvistiko daŭre kreskas. Al tiu ĉi fakto ankaŭ kontribuis la kandidatiga disertacio titolita „Problemoj de internacia lingva komunikado kaj planlingvoj, precipe Esperanto", kiun d-ro Stanislav Košecký defendis la 12-an de septembro 1989 en la Lingvoscienca Instituto de L. Štúr de la Slovakia Akademio de Sciencoj en Bratislava.

La 200-paĝa disertacio enhavas krom enkonduko kaj konkludo tri ĉapitrojn. En la enkonduka parto la aŭtoro traktas la nuntempan kontraŭdiron, kiu konsistas inter multlingveco kaj informa eksplodo. Estas akcentitaj la procedoj de internaciigo de ĉiuj sferoj de la socia vivo, kiuj plene rilatas ankaŭ al la lingva komunikado. La aŭtoro distingas tri sferojn de ĉi-speca internaciigo: la tutmondan, regionan kaj nacian.

La 1-a ĉapitro de la disertacio enhavas analizon de la solvoj de la internacia lingva komunikado (ILK) kun aparta konsidero de la nuna stato en Unuiĝintaj Nacioj, Eŭropa Komunumo, Konsilantaro de Reciproka Ekonomia Helpo kaj la Movado de Nealiancitaj Landoj. Apartan lokon la aŭtoro dediĉas al unuopaj aspektoj de ILK: lingva, teknika, psikologia, ekonomia k. a. La lasta parto de la ĉapitro traktas la demandon de komuna lingvo en internaciaj organizajoj. Ĉi tie precipe estas traktata Esperanto el retrospektiva rigardo.

En la 2-a ĉapitro oni pritraktas la rilaton inter spontaneco kaj konscieco en la lingvo, kiu rezultiĝas en la konstato, ke ĝenerale interesiĝas konsciaj intervenoj de la homo en la evoluon de lingvoj. Ĉe la tipologia klasifiko de planlingvoj Košecký akceptas, ke por la envicigo de planlingvo al la grupo de aprioraj, resp. aposterioraj lingvoj havas decidan rolon la karaktero de la leksika materialo, dum aliaj lingvoebenoj ĉi-rilate ne estas gravaj. La objekto de la 3-a ĉapitro, la plej ampleksa, estas Esperanto. Post ĝeneralaj rimarkoj pri ĝia disvastiĝo, ĝia komunika komunumo kaj kulturaj fenomenoj la aŭtoro prezentas lingvistikan karakterizon de Esperanto laŭ unuopaj ebenoj. Estas akcentite, ke la kompreno de Esperanto kiel nur eŭropa lingvo estas tro malvasta.

En la dua parto de la ĉapitro la aŭtoro analizas kelkajn pli detalajn flankojn de la lingva konstruo de Esperanto: ĝia morfema strukturo kompare kun tiu de la slovaka, manifestiĝo de asimetria dualismo sur la morfologia ebeno, „facileco" laŭ tri ĉefaj aspektojn (lernebleco, manipulebleco, komprenebleco), ĝia komparo kun la strukturo de Interlingua kaj mallonge pri ĝiaj malregulajoj. Necesas konstati, ke la aliro al tiuj ĉi partaj temoj kaj la prezentitaj rezultoj montras la kapablon de la aŭtoro prilabori starigitajn problemojn el la pozicioj de interlingvistiko. En la teksto oni trovas multajn utilajn lingvistikajn observojn. Netradicie vaste farita konkludo sumigas, ĝeneraligas, sed ankaŭ kompletigas la rezultojn de ĉiuj tri ĉapitroj. Sekvas resumoj en Esperanto kaj la rusa. La bibliografio enhavas 165 titolojn.

La disertacio havas tre ampleksan temon, kio ne permesas pli profundan prilaboradon de ĉiuj prezentitaj kaj menciitaj problemoj. Ĝia ĉefa celo estis prezenti la ĉefajn sferojn de interlingvistika esplorado, en kio la aŭtoro sukcesis. Li ankaŭ sukcesis pruvi, ke la argumentado, kutima ĉe multego da lingvistoj, pri la netaŭgeco de Esperanto esti lingvo de ILK laŭ lingvistika vidpunkto ne havas realan kaj seriozan bazon.

La disertacio de d-ro Stanislav Košecký, kiu per ĝia defendo akiris la sciencan gradon „kandidato de filologiaj sciencoj", estas laŭ mia scio la unua tiu-speca verko en ĈSSR. Laŭ tiu ĉi vidpunkto ĝi estas grava kontribuo al disvastigado de interlingvistiko kaj al esperebla iniciato de la esploroj en tiu ĉi branĉo de lingvoscienco en nia najbara lando. Estus dezirinde publikigi la verkon en lingvistika eldonejo.

Eble estas utile mencii, ke Stanislav Košecký estas germanisto, kiu aktivas jam dum certa tempo sur la interlingvistika kampo. Li estis la organizinto de la unua interlingvistika seminario de ĈSSR, kiu okazis dum majo 1987 en Tatranská Lomnica (Altaj Tatroj), kaj kiun partoprenis gvidaj profesiaj lingvistoj el ĈSSR. La prelegoj aperis dulingvaj en la libro „Problémy interlingvistiky. Zbornik materiálov z interlingvistického seminára" (Vysoké Tatry 20. — 22. mája 1987), red. de Stanislav Košecký. Bratislava 1987, 180 p. En la sama jaro li partoprenis la 14-an Internacian Kongreson de Lingvistoj en Berlin (GDR). Košecký ankaŭ redaktis por Slovakia Esperanto-Asocio kvar volumojn sub la kadra temo „Kontribuo al lingvaj teorio kaj praktiko" (Poprad: Slovakia Esperanto-Asocio, I: 1983, II: 1984, III: 1985, IV: 1986). Jam en la jaro 1981 Stanislav Košecký prezentis al la Universitato J. A. Komenský diplomlaborajon kun la temo „Komparo de la morfemaj strukturoj de la slovaka kaj Esperanto. Poste li doktoriĝis (laŭ ĉeliasistemo „malgranda doktoreco", tiu titolo mankas en la germana sistemo). Lia kandidatiĝo respondas al la doktoreco A en GDR, al la kandidatiĝo en Soveta Unio, Bulgario kaj Hungario. Do tiu disertacio ebligos al li lingvistikan karieron en ĈSSR. Kaj fine, pro bibliografiaj kaŭzoj ni menciu la originallingvan titolon: **Stanislav Košecký: Problémy medzinárodnej jazykovej komunikácie a plánové jazyky „najmá Esperanto", Bratislava: Jazykovedný Ústav L. Štúra Slovenskej Akadémie Vied, 1989, 200 p.**

Detlev Blanke

Kandidatiga disertacio pri frazeologio

En decembro 1989 en Moskva Lingvoscienca Instituto estis defendita la Kandidatiga disertacio „Principoj de Genezo kaj Evoluo de Frazeologio en Esperanto kaj en Etnaj Lingvoj". Ĉisube estas prezentita koncize ĝia enhavo:

Ĉapitro I:
Historio kaj Teorio de la problemo: kompara frazeologio kaj planlingvoj (PL); specifaĵoj de frazeologio en PL; metaforeco en PL; idiomeco kaj frazeologio; fundamentaĵoj de Esperanta frazelogio; ĉefaj prifrazeologiaj verkoj; frazeografio de Esperanto ktp.

Ĉapitro II:
Proverbaro Esperanta — frazeologia bazo de Esperanto: historio; strukturo de Proverbaro; komponantaro de frazeologiaj unuoj; sintaksaj modeloj; semantiko; sinonimo kaj varieco; antonimio; deveno de unuoj; krea laboratorio de L. Zamenhof, ktp.

Ĉapitro III:
Frazeologio Postzamenhofa: originoj kaj fontoj; gramatika aspekto de frazeologiaĵoj; frazeologia derivado polisemio; ĉefaj procedoj en E-frazeologio, ktp.

Konkludo

Bibliografio

Aldono: Rusa-Esperanta vortareto de frazeologiaj ekvivalentoj.

Interesitaj personoj povas ricevi de aŭtoro referaĵon de disertacio (rus-lingvan!). Turnu vin al: Leonid N. Mjasnikov, USSR, 182100 Velikie Luki, Raboĉaja str. 2/1, kv. 4.

Leonid N. Mjasnikov

Ni kondolencas pro la forpaso de

— Mirdza Burgmeister el Riga, Latvio, fine de decembro 1989, kiu apartenis al la plej aktivaj latvaj esperantistoj,
— Kurt Ehmig el Hildburghausen, la 22-an de februaro 1990, iama LEA-ano,
— Walter Kemnitz el Wittenberg, la 22-an de oktobro 1989,
— d-ro Peter Flögel el Berlin, la 22-an de marto 1990, prezidinto de la grupo Berlin — Prenzlauer Berg,

Informiloj — taskoj kaj neceso

Du informoj pri la intencata ĉesigo de la aperado de informiloj, nome de „Dresdena Esperanto Informilo" el GDR, kaj de „Voĉo" el Osaka, Japanio, igas min esprimi mian opinion pri tiuj ĉi intencoj. Ambaŭ organizaĵoj menciis problemojn, kiuj certe ne estas malfacile solveblaj. En „Dresdena Esperanto-Informilo" oni skribis i. a.: „La eĥo kaj la preteco de la propraj membroj por kunagado estis malpli ol tiu de ekz. eksterlandaj esperantistoj", kaj plue: „. . . ankaŭ, se ĝi (la ĉesigo de la informilo) ne konformas al la strategia linio de UEA". Sendube ankaŭ la financado ludas tre gravan rolon. Sed tiun problemon oni povas solvi per pli bona organizado, pli bona distribuado de la kotizoj, sed ankaŭ per subvencioj el aliaj enspezoj. Ni nun rigardu la problemon desur la fundamento je konkreta ezkemplo. Nia subdistrikta Esperanto-organizaĵo havas nuntempe 67 pagantajn membrojn. El tiuj estas 30 personoj tute pasivaj, do illi ne partoprenas la grupan agadon pro diversaj kaŭzoj. El la aliaj 37 personoj ankoraŭ ĉ. 20 membroj nur unu- aŭ dufoje ĉiu-jare partoprenas pli gravajn aranĝojn, dum la restantoj estas niaj aktivuloj. Tiu ĉi proporcio verŝajne konformas al la internacie dominanta tendenco en Eŭropo. En nia subdistrikta organizaĵo ni tamen ne nur organizis Esperanto-instruadon, sed ni atribuas ankaŭ grandan signifon al la perado de la etoso de la monda Esperanto-movado. Do, ni klarigas al niaj esperantistoj, ke ili estas ankaŭ gravaj avangardistoj en la tutmonda pacmovado kaj ke UEA estas modela ekzemplo por la paca kunekzistado de homoj de diversaj rasoj, nacioj, religioj, mondkonceptoj ktp. kaj ili per tio kiel esperantistoj ne nur pasive, sed aktive agas por paco kaj interkompreniĝo inter la popoloj. La pasivaj same kiel la nur malmulte aktivaj membroj, nekalkulite la tute malmultajn esceptojn, restis membroj kaj ne forestas la aktivan kunagadon pro tio, ke ili rigardas Esperanton kiel sensencan kaj nenecesan aferon, sed ili havas respektindajn objektivajn kaŭzojn, kiujn oni devas respekti kiel estro. Al tiuj pasivaj membroj mi havas amikecan kontakton, kio montriĝas en babilado dum strata renkontiĝo ktp. kaj ili ĉiam certigas min, ke kiel antaŭe ili havas simpation por Esperanto. Do, ili restas por mi gravaj portantoj kaj agitantoj de Esperanto kaj tio montriĝas i. a. en la ĉiujara altiro de novaj membroj.

Jen la decida demando. Kiamaniere mi kiel estro povas kontaktiĝi kun tiuj pasivaj kaj malmulte aktivaj membroj? Sendube la publika agado en gazetoj, per ekspozicioj, montrokesto ktp. ankaŭ atribuas al tio. Tre grava kaj mia-opinie nepre necesa helpo estas la kontinua aperado de nia „Balta Maro Informilo", je kies eldono nia Stralsunda organizaĵo grave kontribuas. Ĝi estas por mi la kunligilo al la menciita membraro, kies signifon oni ne subtaksu. Aliflanke oni ne atendu eĥon aŭ eĉ aktivan kunagadon al la informilo de tiuj personoj. La redakcioj kaj prezidantoj devas stimuli instigante la membrojn al la aktiva kunagado raporti pri travivaĵoj kaj okazaĵoj. Tiamaniere ni ne havas problemojn.

Plua grava flanko de informiloj estas, ke la membroj volonte uzas ilin kiel aldonaĵojn en leteroj kaj per tio ili fariĝas parto de la internacia interŝanĝo de informoj kaj spertoj.

Ĉi-sence la taskoj kaj celoj de informiloj estas multflankaj kaj oni ne subtaksu ilin. Ili estu firma parto de bona organiza agado.

Hans-Joachim Borgwardt, Stralsund

Al la abonantoj de „Saksa Kuriero"
Pro personaj kialoj Joachim Schulze ĉesis la redaktadon de „SK". Tamen, ni provos, aperigi la numerojn 2 - 6/90 kiel unu broŝuro kun ilustrita historio de 25-jara GDREA. Krom tio ĉiu p e t o n t o ricevos senpage de la Centra Estraro de GDREA ekzempleron de la GDR-eldono de „Paco"/89.

CE de GDREA

Prof. Karl-Heinz Schulmeister — 65-jara

Se la esperantistoj en Kulturligo de GDR ĝuis konsiderindan subtenon por sia laboro dum jam 25 jaroj, tio ne nur ŝuldiĝas al ilia celkonscia agado sed ankaŭ en nesubtaksinda grado al la Sekretario de Kulturligo, prof. d-ro Karl-Heinz Schulmeister. La ĉefo de Kulturligo, ankaŭ membro de la prezidio de Popola Parlamento (ĝis marto 1990), ĉiam montris simpation al la agado de GDREA, por la idealo de la esperantistoj. Tiu lia persona sinteno ne malofte pozitive influis decidojn, kiuj tre helpis al GDREA. Se en Kulturligo dum la pasintaj jardekoj regis liberala kaj kulturplena atmosfero, karakterizita per toleremo, kunlaboremo kaj afereco, tio estas ankaŭ merito de la gvida kulturliga funkciulo. La 6-an de majo 1990 prof. Schulmeister fariĝis 65-jara. Li ne plu gvidas Kulturligon. La cirkonstancoj drase ŝanĝiĝis. Tamen, lia influo certe postefikos. Li espereble trovos la merititan trankvilon por sin dediĉi al siaj sciencaj, kulturpolitikaj kaj aliaj interesoj. La esperantistoj de GDR tre kore gratulas al la jubileulo kaj dankeme rerigardas al la fruktodona kunlaboro en la pasinteco. Al prof. Schulmeister sanon kaj forton en la nova tempo.

CE de GDREA

Hans Heinel 65-jara

Dum nia 25-jara historio de GDREA Hans Heinel aktive partoprenis pli ol 20 jarojn. Ekde 1972 li apartenis al la Prezidio kaj en 1981 fariĝis la unua prezidanto de GDREA. En 1987 Hans denove ricevis la konfidon de la delegitoj. Hans Heinel havas ne malgrandajn meritojn pri la evoluo de GDREA. Lia klara gvidstilo ligita kun humuro kaj toleremo ebligis al la Centra Estraro efikan laboron. Kiel membro de la komitato de UEA kaj kelkfoja partopreninto en la Universalaj Kongresoj li helpis prezenti la kontribuon de GDREA en la internacia movado al la esperantistaro de la movado.
La 6-an de majo ĉi-jare li fariĝis 65-jara. Lia sano bedaŭrinde ne estas la plej bona. Tre kore gratulante pro tiu vivojubileo kaj dankante al Hans pro la solidare kaj kolegece farita laboro por nia asocio, ni deziras al li antaŭ ĉio sanon, plue bonfarton en la Centra Estraro kaj aktivan ĝuon de Esperanto. Li ne plu estas nia prezidanto, sed nian amikecon ni konservos al li esperante vidi lin ankoraŭ ofte en nia Centra Estraro kaj aliloke en la „verda lando".

Ino Kolbe-jubilea

Strange, ĉu ne? Ni memorigas, ke Ino Kolbe el Leipzig fariĝis 76-jara, la 28-an de februaro 1990, kaj ni tre kore gratulas nur nun. Nu simple ni forgesis gratuli en 1989 al tiu senlaca kaj simpatia Ino, kiu multe laboris por la kunigo de materialoj pri la historio de laborista Esperanto-movado. Ino Kolbe estas la filino de la fondinto de Germana Laborista Esperanto-Asocio, Reinhold Voigt el Leipzig. Ni esperas iam eldoni ĉirkaŭ 100-paĝan studon, kiu baziĝas je ŝia materialo.
Al Ino ni deziras ankoraŭ multajn „rondajn" kaj „nerondajn" naskiĝtagojn.

La red.

Ni kore gratulas

— pro la distingo de Rudolf Hahlbohm, Berlin, per la Honora Pinglo de Kulturligo en oro.

— pro la distingo de Werner Pfennig, Neubrandenburg, per la Honora Pinglo de Kulturligo en arĝento

— al Ruth Partecke, Eisenach, pro ŝia 65-a naskiĝtago la 12-an de septembro 1989.

— al Friedel Greif el Leipzig, iama membro de GLEA, kiu festis sian 80-an naskiĝtagon la 26-an de marto 1990.

— al Paul Köster el Rostock, kiu fariĝis 80-jara la 23-an de marto 1990.

Preiserhöhung für „der esperantist"

Liebe Leser! Wir sind leider gezwungen, den Verkaufspreis für „der esperantist" einschneidend zu erhöhen. Mit 0,30 Mark waren die Kosten dieser Zeitschrift nie zu decken, so daß unser Verbandsorgan immer einen enormen Zuschuß benötigte. Die veränderten finanzpolitischen Bedingungen in unserem Land zwingen uns nun dazu, pro Nummer den Betrag von 2,00 M zu erheben. Diese Regelung tritt mit Nr. 4/1990 in Kraft.

Sie haben die Möglichkeit, bis zum 10. Juni beim PZV Ihr Abonnement zu verändern. Per 1. 7. 1990 wird dann vom PZV der neue Preis kassiert.

Wir werden uns bemühen, ab Nr. 1/1991 die Zeitschrift grafisch besser und inhaltlich noch interessanter zu gestalten. Wir hoffen auf Ihr Verständnis und Ihre Solidarität.

Die Redaktion

Finfine aperis

la libro „Prologo" de la sovetia eldonejo „Progreso", anoncita antaŭ kelkaj monatoj! Temas pri grandformata, 160-paĝa rakonto pri la revoluciaj eventoj en Rusio en 1905, konsistanta el serio da multkoloraj desegnaĵoj kun esperantlingvaj tekstoj. Mendu tuj ĉe la Centra Estraro, ĉar ni disponas nur pri tre limigita stoko. Unu ekzemplero kostas 20,— markojn.

SEFT '90

Denove okazos la tradicia Somera Esperantista Familia Tendaro en la belega arbaroriĉa kaj multlaga regiono de Feldberg en la norda parto de GDR. Kiam? De la 18-a ĝis 25-a de aŭgusto 1990. Pri kondiĉoj kaj teknikaj detaloj petu informojn de Werner Pfennig, Fohlenwinkel 13, Neubrandenburg, DDR — 2000.

3-a kurso por E-instruantoj en 1990

De la 13-a ĝis la 21-a de oktobro 1990 okazos en la kampadejo „E. André" en Göhren sur la insulo Rügen la 3-a intensa kurso por profesiaj instruistoj kaj Esperanto-instruantoj. En tri ŝtupoj (komencantoj, progresintoj, konversacio) eblas lingve kaj metodike kvalifikiĝi.

Kotizoj: 150,- M (membroj de GDREA) aŭ 150,- DM (eksterlandanoj). Ekskurso al Trelleborgo kostas pluse ĉ. 60,- M/DM. Anonciĝu ĝis la 30-a de aprilo (se vi deziras ekskursi) aŭ ĝis la 30-a de junio (sen ekskurso) ĉe: Heinz Weißflog, Am Stadtrand 8, Fach 5—08, Saßnitz, 2355, DDR.

La **2-an kurson por instruistoj** oktobre 1989 en Saßnitz, sukcese partoprenis 15 esperantistoj, instruitaj de E. Kraus (Hoyerswerda, por komencantoj) kaj A. Zejdler (Bialistoko, PL, por progresintoj) kaj informitaj pri metodikaj kaj movadaj temoj de d-ro D. Blanke kaj U. Becker (ambaŭ Centra Estraro). La partoprenintoj, inter kiuj estis pluraj aktivaj kursgvidantoj, substrekis la neceson urĝe havigi lernolibron por infanoj kaj materialojn por ludoj (eventuale regule en niaj gazetoj).

Laŭ informoj de Heinz Weißflog

Kulturligo pluvivos

La eksterseria kongreso de Kulturligo de GDR, okazinta la 23-an kaj 24-an de marto 1990 en Potsdam estis sukcesa. Oni povas mencii i. a. jenajn rezultojn:

1. La tre polemikaj kaj kontraŭdiraj debatoj klare montris, ke Kulturligo — male al multaj aliaj „malnovaj" organizaĵoj en GDR — ja vivas. Li bazaj grupoj en la diversaj societoj, asocioj kaj aliaj organizaj formoj daŭrigas sian agadon, kvankam sub pli malfacilaj kondiĉoj.

2. Nur malmultaj membroj forlasis la organizon. KL ankoraŭ havas ĉ. 260 000 membrojn. Tamen, bedaŭrinde la Filatelista Asocio versâjne volas komplete memstariĝi kaj forlasi la organizaĵon.

3. La 500 delegitoj elektis novan Ĉefan Estraron, kiu nun konsistas el 35 personoj. El inter 4 kandidatoj oni elektis — tute surprize — relative nekonatan virinon: Marianne Piehl. Ŝi rapide akiris estimon.

[resto sur p. 47]

Ulrich Lins: La danĝera Lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto. Stuttgart: Bleicher 1988, 546 p.
Ulrich Lins: Die gefährliche Sprache. Die Verfolgung der Esperantisten unter Hitler und Stalin. Stuttgart. Bleicher-Verlag 1988, 326 p.

La libroj de la okcidentgermana historiisto, politologo kaj japanologo Ulrich Lins estas eksterordinaraj. Ili estas la ĝis nun plej profundaj kaj plej ampleksaj studoj pri fenomeno, unika en la kulturhistorio de la homaro, studoj pri la subpremo, persekutado, eĉ neniigado de adeptoj de internacia neetna lingvo.
La Esperanta originalo estas la plej kompleta kun multege da fontindikoj kaj cititaj materialoj. La germana varianto estas pli ol ampleksa resumo. En ĝi mankas la tuta ĉapitro pri la persekutoj en orienta azio. La aliaj ĉapitroj estas densigitaj.
Sed pri la enhavo mem (laŭ la Esperanta originalo). Lins komencas sian esploron pri la „suspekto kontraŭ nova lingvo" (15 — 90), kiun Esperanto jam renkontis post sia apero en la cara rusio same kiel en Germanio aŭ ĉe la Ligo de Nacioj. Aparte dum la Respubliko de Weimar kaj dum la posta „Tria Regno" Esperanto kaj ĝiaj adeptoj suferis diversajn atakojn ĝis rekta malpermeso sub Hitler. Pro tio la koncerna ĉapitro tekstas „Lingvo de judoj kaj komunistoj" (91 — 151). Lins estas i. a. bona konanto de la azia Esperanto-movado kaj pro tio ankaŭ donas bonan superrigardon pri la „persekutoj en orienta Azio" (157 — 188), kie la lingvo ofte estis ligita al kontraŭreĝima rezistado. Aparte amplekse la aŭtoro traktas la situacion en Soveta Unio. Tio postulas trakton de la historio de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) kiel plej forta laborista Esperanto-asocio kaj ties rilatoj al Sovetrespublika Esperantista Unuiĝo (SEU) („Lingvo de etburĝoj kaj kosmopolitoj", p. 189 — 246). Ni legas pri la lingvopolitikaj fonoj de la stalinismo kaj ĝiaj reflektoj en la sovetia Esperanto-movado, pri la skismo de la laborista Esperanto-movado. Lins klarigas el vidpunktoj, kiujn ni hodiaŭ, post scio pri la stalinismo kaj ĝia fiasko, devas akcepti („Skismo en SAT kaj pereo de la soveta movado", p. 247 — 315). „Socialismo kaj lingvo internacia" (p. 316 — 382) tekstas interesa ĉapitro, kiu provas prilumi la teoriajn kaj ofte pseŭdomarksismajn diskutojn pri lingvisto kaj ties rilatoj al la internacia lingvo Esperanto respektive al la „monda komuna lingvo". La plej dolora ĉapitro sendube estas tiu pri la likvido de Esperanto en Soveta Unio mem „Kialoj de la pereo de Esperanto en Soveta Unio", p. 383 — 432). Kaj la lasta ĉapitro traktas la situacion de Esperanto, aparte en la orienteŭropaj landoj „Post la Dua Mondmilito" (p. 433 — 525). Per konkluda ĉapitro la aŭtoro fermas la spirhaltigan historion. Al la klare redaktita libro apartenas listo de mallongigoj, kronologia tabelo pri la plej gravaj eventoj (de la naskiĝo de L. Zamenhof en 1859 ĝis la centjariĝo de Esperanto en 1987) kaj indekso de personoj. Ankaŭ ne mankas kelkaj fotoj kaj dokumentoj.
La germana eldono ne disponas pri la same detala materialindiko kiel la Esperanta. Ĝi enhavas tamen 205-eran bibliografion kaj same personindekson.

La Esperanta eldono jus aperis kiel represo en la sovetia eldonejo „Progreso" en Moskvo, verŝajne ankoraŭ ĉi-jare. Ĝi enhavas postparolojn de S. N. Kuznecov kaj de la recenzanto.
En nia posta diskuto pri kelkaj trajtoj de la studo ni limigas nin je la esperantlingva eldono.

1. Unu el la multaj pruvoj, ke la planlingvo Esperanto ne estas nur projekto sed vera lingvo, estas ĝiaj sociaj funkciado kaj rolo. Ni ne legis ion rimarkindan pri persekutado de volapukistoj, idistoj aŭ interlinguaanoj. Oni ne persekutas ion, kio ne funkcias, ĉe kio oni ne vidas realan aŭ potencialan funkciadon. Krome, kiel Lins en sia libro klare montris, la persekutoj celis ĉefe la fenomenon de demokratia internacia komunikado, la sendiskriminacian samrajtan transnacian kontaktadon inter diverslingvuloj. Priskribante tiujn malhelajn aspektojn de la historio de la Esperanto-movado, la aŭtoro fakte ankaŭ pledas por pli klara agnosko de la rolo, kiun Esperanto povus ludi en la klopodoj por nova internacia komunika ordo. Li pledas por tio, ĉar al la bezonoj de la nuntempo ne respondas persekutado kaj subpremo sed agnosko kaj ĉiuflanka subtenado de Esperanto kiel **unu** (ne la sole ebla) rimedo de internacia dialogo por reciproka fido, por malkonstruo de antaŭjuĝoj kaj por interpopola amikeco, kiu ne funkcios sen intensivaj interindividuaj rilatoj.
Ke okazis persekutoj kontraŭ Esperanto kaj esperantistoj, ni jam sciis antaŭ la apero de la libro. Sed la unuan fojon ni havas antaŭ ni sisteman superrigardon pri tre granda, sendube ŝoka amplekso de tiuj persekutoj. Neniu sincera homo povas esti netuŝita de tiuj kruelaj faktoj. Per sia kolosa laboro, kiun la aŭtoro dum pli ol 20 jaroj investis en la temon, li detruis ĉiujn eblecojn tabuigi ĝin. Kaj — ni estu sinceraj, forpremo aŭ ignoro de tiaspecaj temoj fojfoje nutris la iluzion, ke eble tamen oni nur troigis kaj ĝeneraligis unuopajn kazojn.
Ne — oni ne povas eviti la temon. Eĉ kontraŭe, por regajni aŭ konservi la konfidon de multaj homoj, tiuj esperantistoj, kiuj tro longe silentis, devas esti inter la unuaj, kiuj helpu malkaŝi la tutan veron, sen troigoj, sen bagateligoj. Pro tio estas tre laŭdinda la decido de la eldonejo „Progreso" en Moskvo, represi la verkon de Ulrich Lins.

2. Pro kio, do, ni bezonas la libron de Lins? Certe, por lerni el la historio! Sed kion? Ĉu lerni, ke la Esperanto-movado ne engaĝu sin por sociaj celoj? Tiam ĝi estus kondamnita al sensignifa sekto. Ĉu estis malĝuste, ke komunistaj kaj laboristaj esperantistoj volis utiligi Esperanton por siaj idealoj? Se oni konkludas ke jes, oni, laŭ nia opinio, malĝuste konkludas. La dogmiĝo de marksismo-leninismo en la formo de stalinismo, ties multaj teoriaj distordoj kaj akrobatajoj neniel estas kulpo de tiuj homoj, kiuj sincere kredis

al la idealoj de la komunismo kaj laborista movado kaj batalis por ili. Kaj tiuj idealoj, kvankam pridubataj, ne malaperis! Do, kion lerni? Ĉiu leganto trovos sian respondon. Sendube, la kulturhistoriisto kaj lingvopolitikisto konfirmos la ĝeneralan rezulton de la libro, ke la rilato de ŝtato al la Esperanto-movado kaj ties idealoj certagrade estas esprimo pri la funkciado aŭ nefunkciado de enlanda demokratio.
La libro ankaŭ bone montras, ke estas absurde identigi lingvon kun difinita ideologio. Aserti, ke difinita lingvo estas la lingvo de amikeco, de imperiismo, de socialismo, de kosmopolitismo, ke lingvo estas progresema aŭ reakcia k. s. estas tute absurde. Similspeca etikedado ankaŭ nuntempe fojfoje estas trovebla por difinitaj lingvoj. Kompreneble, kaj ankaŭ tion montras la libro, la adeptoj, la disvastigantoj de Esperanto, per sia engaĝo por ĝuste tiu ĉi lingvo ja esprimis certan socipolitikan sintenon, lingvopolitikan elekton, la elekton de alternativa modelo por pli efika, samrajta internacia komunikado. Sed tio ne aŭtomate faras Esperanton lingvo de paco kaj amikeco. La konkreta uzado decidas.
Sed ni bezonas la libron ankaŭ pro alia kialo: Se jen aŭ jen Esperanto ankoraŭ estas subpremata kaj persekutata, la studo de Lins povas liveri argumentojn kaj helpi al ni averti, por ke oni lernu el la historio. Krome, fojfoje, estas bone montri al antaŭjuĝemaj homoj, kiuj eble nur pro siaj antaŭjuĝoj, ignorado kaj miopeco estas kontraŭuloj de Esperanto, ke ekzistas morala devo antaŭ la Esperanto-movado ripari, kion la persekutoj detruis (se oni tion entute povas „ripari"). Pro tio tradukoj en aliajn lingvojn estus tre bonvenaj.

3. Se ni ja tre decide substrekis la grandan valoron de la libro, tio tamen ne signifas, ke ni ne devus fari kelkajn rimarkojn kaj atentigojn, prezentante nian propran vidpunkton.

3.1. Neniu havas la kompletan veron. Ankaŭ la historiisto estas (nur) daŭra serĉanto. Ulrich Lins tre skrupule serĉis. Lia ŝajne unua parta ampleksa studo pri la temo de persekutoj jam aperis antaŭ pli ol 20 jaroj: En 1966/67 en „Germana Esperanto-Revuo" publikiĝis lia profunda eseo „Esperanto dum la Tria Regno", kiun ni enprenis en nian antologion „Socipolitikaj Aspektoj de la Esperanto-movado" (Budapest, Hungara Esperanto-Asocio 1978, 1986). Ekde tiu tempo li daŭrigis la kolektadon de dokumentoj kaj amasigis nekredeble ampleksan materialon, kiun li nun prezentas al ni tre sisteme kaj klare. Kompreneble, li ankaŭ tre dependis de tiu materialo, kiun li sukcesis atingi. Je pli ol 70 % la libro traktas la sorton de Esperanto sub la cara reĝimo kaj (aparte) en Soveta Unio. Kaj ĝuste multajn sovetiajn fontojn, kiuj necesus por vere objektiva prezento, li ne povis konsulti. Legante la libron oni pro tio ofte havas la impreson, ke la sovetia movado daŭre nur manovris, ke ĝiaj gvidantoj pseŭdoscience teoriumadis kaj baraktis por iel transvivi. Ŝajnas al mi, ke tiu impreso estus tro unuflanka kaj ke tre necesas pliaj precizigaj esploroj flanke de sovetiaj historiistoj surbaze de dokumenta materialo. Kompreneble, kaj pri tio la aŭtoro ja avertis en la antaŭparolo, li ne traktis la internan historion de la Esperanto-movado, sed nur difinitajn aspektojn de ĝi. Grandega manko, kiu malfaciligas la ĝustan takson de la multaj prezentitaj faktoj, estas la malesto de historia verko pri la sovetia Esperanto-movado. Por Lins la ĉefa, kvankam ne sola, fonto-materialo kaj ties interpreto venas el la direkto de SAT kaj ties fondinto Lanti. Ne mirige, ke tial ekz. la personeco de E. K. Drezen devas aperi tro nigra, kion ni ne povas akcepti. Ni scias pri la profundaj konfliktoj inter SAT kaj SEU, kaj tiuj konfliktoj ne nur estis reflekto de stalinismaj reprezalioj. Marksisme orientitaj esperantistoj havis la rajton pri propraj vidpunktoj kaj tial iam ja devis konflikti kun teorioj de Lanti, kiuj ja ludis gravan rolon en la politiko de SAT, kvankam tiu organizajo sin deklaris supertendenca. Ni do atendas seriozan kritikan analizon de la materialo koncernanta SEU-n flanke de sovetiaj historiistoj-esperantistoj, kiuj bone orientiĝu i. a. en la sfero de la lingvo-politiko. Kompreneble necesus alirebleco al koncernaj sovetiaj arkivoj kaj dokumentaj fontoj.

3.2. Ampleksan ĉapitron la aŭtoro dediĉas al la temo „Socialismo kaj lingvo internacia", kunmetante vere interesan materialon. Tamen por trakti tian temon ne sufiĉas baziĝi sur citajoj kaj vidpunktoj ĉefe de Marx, Engels, Lenin, Kautsky kaj Gramsci. Bedaŭrinde tro ofte ĉe multaj aŭtoroj „marksisma" traktajo estis kunmeto de kelkaj citajoj de klasikuloj kaj Stalin kun kuraĝa kaj foje fantazia interpretado. Por ke studo estu marksisma ne sufiĉas nomi ĝin tia . . . Ĉefe gravas apliki la m e t o d o j n de la marksismo, do la metodojn de la dialektika kaj historia materialismo.
Bela ekzemplo estas la italo Antonio Gramsci, kies artikolo laŭ Lins „konsistigas la tre kredeble plej profundan analizon de Esperanto laŭ marksisma starpunkto" (o. 332). Nu — Gramsci simple ne komprenis la problemon de Esperanto kaj, kiel multaj ĉi-rilate suprajaj kaj arogantaj intelektuloj, juĝis laŭ antaŭjuĝoj. Li ekz. transprenis la siatempe modan koncepton pri la lingvo kiel organismo. Ĉu Gramsci do „marksisme" kaj „profunde" analizis?!
Ni ankaŭ ne trovas justa la traktadon de la eventualaj rilatoj de Lenin al Esperanto (ĉu pozitivaj, ĉu negativaj aŭ neŭtralaj), per kiu la aŭtoro, forvišante per unu gesto la ĝis nun plej bonan detalan studon de S. N. Podkaminer pri la temo, kvazaŭ ŝajnigas, ke Podkaminer elpensis iun fantaziajon. Tion Podkaminer ne meritas. Lins opinias, ke „impresas kurioze, se fojfoje sovetiaj esperantistoj klopodas prezenti lin (Lenin — D. B.) kiel simpatianton de Esperanto" (p. 339). Tion i. a. faris Ints Čače per tre dubindaj elpensaĵoj (ekz. en „Esperanto" 2/1969), sed ne Podkaminer. Vere uzebla kaj profunda studo pri socialismo kaj internacia lingvo ankoraŭ mankas. Almenaŭ tri alireblecoj ŝajnas al mi fruktodonaj:
a) la optimisma prognozo (eĉ se utopia) de la marksismo pri demokratia monda socio de la estonteco, b) la signifo de la konscia elemento en la sociaj procesoj (kaj ankaŭ lingvo estas socia fenomeno) kaj c) la leni-

nisma koncepto pri samrajteco inter nacioj kaj lingvoj, kiu, cetere, neniam estis realigita. La aktivan, do ankaŭ modifopovan, rilaton de la homo al sia lingvo jam substrekis Marx kaj Engels en „La Germana Ideologio".

3.3. Ni ne estas konvinkitaj, ke la prezento de la laborista korespondado estas tute ĝusta (p. 410 k. s.). Sendube ekzistis multaj rigidajoj, pri kiuj la aŭtoro prave atentigas. Sed ankaŭ estas fakto, ke multaj korespondaj ligoj inter sovetiaj kaj ekz. germanaj laboristaj esperantistoj estis tre viglaj, fruktodonaj kaj tute ne ŝablonecaj. Ili tre kontribuis al la politika kleriĝo kaj evoluo de multaj germanaj esperantistoj, kiel esprimis multfoje veteranoj de Germana Laborista Esperanto-Asocio, ankoraŭ vivantaj en GDR. Ĉi-rilate ni bonvenigus pli profundan analizon, kiu eluzu pli da konkreta letermaterialo kaj krome intervjuojn kun veteranoj. Anonimaj leteroj el Sovetunio, publikigitaj en „Sennaciulo" (kp. p. 415/416) solaj ne povas esti seriozaj fontoj, des pli, ĉar la fontoj denove estas SAT-materialoj.

3.4. La postmilita evoluo de la Esperanto-movado en la socialismaj (aŭ orienteŭropaj) landoj estis tre kontraŭdira. Ne sufiĉas prezenti nur la stalinismon kiel kialon por la „Granda Silento en orienta Eŭropo" (p. 433). Evidente tre influis la Malvarma Milito, kiu malfavorigis ĉiun ajn internacian aktivadon inter la blokoj, ne nur Esperantan. Kaj tiu Malvarma Milito ne estis nur sovetia afero! Lins tute ĝuste prezentas multajn faktojn pri stalinisma (sed pseŭdomarksisma) argumentado kontraŭ Esperanto. Nescio (vola aŭ nevola), ignorado, antaŭjuĝoj, misprezentoj kaj fantaziaj asertoj, kiuj ofte estis en respondoj de institucioj al esperantistoj, ankaŭ en GDR, povis pli facile aperi kaj rezisti en la klimato de Malvarma Milito kaj en etoso, kiu estis sekvo de la detruo de la sovetia Esperanto-movado.

En la Sovetia Okupita Zono de Germanio (1945 — 1949) simple decidis la ordono de oficiroj. Ĝi ekz. malestigis la daŭrigon de la Esperanta laboro, en kelkaj regionoj komenciĝinta ankaŭ en la kadro de la jam 1945 fondita Kulturligo por Demokratia Renovigo de Germanio. Oni devas tamen ankaŭ konfesi, ke restarigon de la esperantista agado ofte forte negative kuninfluis naive troigita argumentado de superentuziasmaj esperantistoj pri la ĉionsava rolo de ilia lingvo. Tio, ekz., jam ĝenis Gramsci, kaj tio estis unu el la kaŭzoj de lia negativa rilato al la lingvo. Kaj tio ankoraŭ hodiaŭ ĝenas en ĉiu ajn socia medio, krom en la „verda".

3.5. La aŭtoro bone prezentis i. a. la rolon de la unua prezidinto de MEM, Rudolf Burda el Ĉeĥoslovakio, por la relegitimigo de Esperanto. Sendube MEM prezentis eblon por engaĝiĝemaj esperantistoj ligi pacbatalon kun Esperanto, tiel demonstrante ankaŭ la socian utilon de Esperanto. Tio estis grava argumento por MEM, sed ne la sola. Bedaŭrinde Lins ne mencias, ke ĝuste en la kadro de la siatempa UEA (kaj tio validis ĝis 1974) ne eblis esprimi sin pri aktualaj tutmondaj politikaj aferoj rilatantaj al paco aŭ milito. MEM ĉi-rilate ne estis neŭtrala kaj pro tio aldonis al la tutmonda Esperanto-movado gravan komponenton, pruvante, ke multaj esperantistoj ne estas izoliĝemaj sektemuloj sed aktive rilatas al la politika vivo en la mondo.

3.6. Oni ne devas riproĉi al la aŭtoro, ke la postmilita evoluo de Esperanto en la socialismaj landoj ne nepre ĉiam trovas adekvatan prezenton. Eĉ en la unuopaj landoj mem ĝis nun apenaŭ troviĝas sufiĉaj priskriboj pri la evoluo, kvankam tiaj priskriboj estus ege necesaj. Ili necesas, por prezenti tion, kio v e r e okazis, kaj preventi misprezentojn. Kaj krome, la aŭtoro ja ne vivis en tia lando. Tamen, fojfoje oni dezirintus pli da prudenta interpreto kaj ne nur fidon al la Esperanto-gazetaro.
En GDR, ekzemple, la situacio devis esti alia ol en Ĉeĥoslovakio, Pollando aŭ Bulgario. „En GDR, la Esperanto-movado dum multaj jaroj eĉ pli multe postrestis, ol tiu en Ĉeĥoslovakio" (p. 488), skribas la aŭtoro. Eble li pravas. Sed li ne donas klarigon. Necesas konstati almenaŭ la simplan fakton, ke la dua germana ŝtato, FRG, siatempe faris ĉion eblan, por malebligi la internacian akceptiĝon de GDR.
La granda diplomatia izoliteco (rilate al la nesocialisma mondo), en kiu troviĝis GDR, neniel favoris internacian aktivadon aŭ kreon de asocio, kiu propagandus kaj aplikus internacian lingvon. Nur komence de la 70-aj jaroj la politika klimato estis tiom ŝanĝita, ke iom post iom la diplomatia bojkotado disfalis. GDR starigis diplomatiajn ligojn kun preskaŭ ĉiuj landoj. Krom tio saĝaj esperantistoj eĉ dum la 50-aj jaroj havis eblecon agadi por kaj per Esperanto, kion bone montras la aktivado de Ludwig Schödl, kiu fine de la 50-aj jaroj eĉ fariĝis membro de la Germana Packonsilantaro pro sia esperantista agado. (Pri tio aperis artikolo en la GDR-eldono de „Paco" 1989.) Kaj en 1959 unuan fojon GDR-esperantistoj en la kadro de oficiala delegitaro de la Germana Packonsilantaro partoprenis la 44-an Universalan Kongreson de Esperanto en Varsovio. En la posta jaro aperis la unua numero de „Paco" en GDR.
La portopreno de sociaj organizaĵoj aŭ ŝtataj organoj en la reorganizado de la esperantista movado en la socialismaj landoj por la aŭtoro ĝenerale estas suspektinda (tio ja ĝenerale ne okazas en okcidentaj landoj). Ni legas ekz. „En GDR, komisiita gvidi la esperantistojn estis persono, kiu eĉ tute ne sciis la lingvon" (p. 492). Ĉu tio estas ĝusta rezonado? Ĉu nur tiu povas bone agi por Esperanto, kiu konas la lingvon? Fakto, almenaŭ rilate al GDR, estas, ke en 1965 fondiĝis 11-kapa honorofica gvidinstanco en Kulturligo, nomita „Centra Laborrondo de Esperanto-Amikoj", kiu vere gvidis. Tiun Centran Laborrondon prezidis Rudi Graetz, kiun la aŭtoro tre bone konis, sed tute ne mencias. Graetz estis tre aktiva, kapabla kaj modesta esperantisto, por kies politika evoluo — cetere — ligoj al sovetiaj esperantistoj dum la dudekaj jaroj estis tre gravaj. Li estis diplomato kaj post reveno el eksterlando, kune kun aliaj kapabluloj, tre impete kaj saĝe agis por la rekonstruado de la Esperanto-movado en GDR. Rapide Graetz gajnis la ĝeneralan akcepton kaj ŝaton inter

la esperantistoj de GDR kaj ankaŭ eksterlande. La aludita persono, kiu „tute ne sciis la lingvon" estis la sekretario de Centra Laborrondo, Eugen Menger, funkciulo de Kulturligo. Li, kvankam ne sciante Esperanton kaj unue ne tiel bone informita, trovis pli kaj pli simpatia la lingvon kaj la ideon kaj bonege konante Kulturligon, havis grandegan meriton donante la bazon por la tuta posta pozitiva evoluo. Kaj tiun pozitivan evoluon, cetere, la aŭtoro ja agnoskas, evoluo, kiun oni povas konstati por la plej multaj eŭropaj socialismaj landoj. Tamen la aŭtoro ne prezentas la kaŭzojn. Ĉu tia evoluo estas simptomo de „totalecaj" reĝimoj? La aŭtoro tre strange argumentas pri la ŝtata subteno (p. 493): „Ili (la reĝimoj de la socialismaj landoj — D. B.) tion apenaŭ faris pro tio, ke ili malkovris la utilon de la lingvo por propagandi eksterlande siajn socialismajn atingĝojn (kvankam tia uzo ja okazas), sed ĉar ili komprenis, ke permesi kaj legalizi la Esperanto-movadon estas pli prudente, ol subpremi ĝin kaj per tio nutri potencialon de malkontento." Intertempe ni ja sendube scias pli ol iam ajn pri la stalinisma bazo de la orienteŭropaj partiaj gvidantaroj, tamen por Esperanto ankaŭ validas, ke necesas simple akcepti kiel pozitivajn motivojn flanke de la sociaj kaj ŝtataj instancoj,

— ke aktivaj esperantistaj ligoj eksterlanden ja estas grava faktoro por reciproke plilarĝigi la spiritan horizonton de la lingvouzantoj,
— ke internaciaj ligoj helpas malkonstrui klišajn konceptojn pri la landoj servante al la elformiĝo de sentoj de internaciismo kaj popola amikeco,
— ke entute sencohava kaj interesa pasigo de la libera tempo estas grava kultura ago, kaj
— ke la humanismaj konceptoj de Zamenhof, eĉ se parte utopiaj, ja renkontis simpation ĉe **kleraj** funkciuloj.

Jes, tiaj kleraj funkciuloj ja ne malmultis, aparte ne en Kulturligo. Iuj motivoj ludis la decidan rolon por la reorganizado de Esperanto kaj tute ne necesas, imputi al la orienteŭropa ŝtato ĉiam nur negativajn motivojn (kontroli, eviti, eluzi, k. s.). Kaj plue. Kial la malsame motivita manko de emo de iuj esperantistoj de GDR aliĝi al Kulturligo aperas, „ĉar agadon en ties kadro ili ne konsideris plenumo de la espero pri memstara organizaĵo de la esperantistoj" (p. 494), ne estas klare.

Abstrakte skribi pri „memstareco" aŭ „sendependeco" ne alportas utilon. Ke oni varbis kaj varbas por la aliĝo tiujn, kiuj ankoraŭ ne aliĝis sed ja tre volonte profitas el la bona evoluo de la Esperanto-movado, ŝuldata al la forta subteno de Kulturligo, tio estas tamen tute normala afero. Neniu skandalas en GDR, ĉar certa parto de la esperantistoj restas ekster Kulturligo. Ili tamen ĉiam havas eblecon kunagadi. Entute la analizo de la pasinta situacio en la orienteŭropaj landoj estas ne tre kontentiga parto en la libro. Oni bedaŭrinde rimarkas fojfoje sarkasman komponenton ĉe la aŭtora interpreto, kiu devus manki en scienca verko. Tro krudaj ĝeneraligoj kaj ofte nepruveblaj asertoj foje ĝenas. La interpretoj estas ofte tro kuraĝaj. Ekz. ni ne scias, ĉu vere „la ideaj aspektoj de Esperanto ofte kaŭzas kapdolorojn al la oficialaj reprezentantoj de la movado en orienta Eŭropo" (p. 497).

La kritika traktado de diversaj humanismaj, sed utopiaj aspektoj de la spirita heredaĵo en la verko de Zamenhof, ekz. la „interna ideo", ne okazas pro „kapdoloroj", sed pro la fakto, ke tiaj ideoj — almenaŭ laŭ nia vidpunkto — povas bari, kaj tre ofte evidente baras — la komprenon de la vera grandeco de la verko de Zamenhof. Finfine temas pri (tro maloftaj) provoj levi la argumentkapablon de la esperantistoj al pli alta nivelo. Kaj, kompreneble, marksisto havas alian aliron al tio ol alipensa interpretanto. Asertante, ke tiuj studoj „grandparte (estas) destinitaj asekuri la movadon kontraŭ malfavoro, de la aŭtoritatoj" (p. 498), la aŭtoro ŝajne volas supozigi, ke la marksistaj esperantologoj tute ne povas aŭ volas memstare kontribui al teoriaj demandoj, sed nur manipulas por plaĉi al la aŭtoritatoj. Eble ekzistas ankaŭ tiaj homoj, sed la ĝeneraliga tendenco ĉe la aŭtoro ĉi-rilate estas bedaŭrinda.

3.7. Se ni do tamen kun admiro — se ankaŭ kun kelkaj kritikaj demandoj kaj notoj — aprezas la unuajn 3 ĉapitrojn kaj la grandan parton de la kvara, la lasta parto de la libro, kiu traktas la proksiman pasintecon, estas laŭ ni ne tute kontentiga. La aŭtoro ne utiligis la facile ekzistantajn eblecojn konsulti kompetentulojn de la landaj asocioj por iom pli objektive kaj zorgeme priskribi kaj interpreti. Kompreneble, ni kapablas juĝi nur la evoluon en GDR. Kolegoj el la aliaj orienteŭropaj landoj devus doni siajn rimarkojn. Tio estas tre grava i. a. pro tio, ĉar ĉiam denove ekzistas provoj nebuligi unu klaran fakton, nome, ke — malgraŭ ĉiuj persekutoj — en la plej multaj nuntempaj orientaj landoj, eŭropaj kaj ekstereŭropaj, la Esperanto-movado atingis kvanton kaj kvaliton, kiu ĝis nun neniam estis atingita en okcidentaj ŝtatoj.

Jen, kelkaj kritikaj notoj kaj vidpunktoj. Ŝajnas al ni, ke la aŭtoro ne povis atendi senkomentan akcepton de ĉio. Restas tamen la fakto, ke ni havas je nia dispono gravegan verkon de kompetenta kaj serioza konanto de la pasinta kaj nuntempa Esperanto-movadoj. Jes, restas certe kelkaj demandoj, ĉiukaze i. a. tiu, kiel kontribui al la forigo de kelkaj mankoj. Sendube ni urĝe bezonas sobre verkitan historion de SEU (ĝis 1937), kiu ekvilibre prezentu la atingojn kaj la mankojn. Verŝajne ni devas veni ankaŭ al pli senantaŭjuĝa kritika retaksado de SAT, kiu prezentas aparte sub la nuntempaj aspektoj pli da pozitivaj elementoj ol foje vidite. Mankas, krome, ampleksaj kaj fidindaj studoj pri la historio de la laborista Esperanto-movado. Jam estas malfacilege trovi dokumentojn pri la 20-aj kaj 30-aj jaroj, ankoraŭ vivas nur malmultaj veteranoj. Savado de dokumentoj, skriba, sonbenda aŭ vidbenda registro de rememoroj de la veteranoj necesas. La libro de Lins devigas al pli singardaj interpretoj de multaj eventoj kaj aktivecoj.

Kaj finfine fariĝis tempo, ke la landaj asocioj de la pleje koncernitaj orientaj lan-

doj skribu la historion ankaŭ de la malfacila periodo post 1945.
Ĉion ĉi la libro de Ulrich Lins tre stimulas. Kaj ĉion ĉi la aŭtoro supozeble bonvenigus por iam prilaborota nova eldono. Ke la libro ĝuste nun povas aperi en Soveta Unio, estas simptome por nova fundamente grava etapo en la vivo de Eŭropo. Ni ne dubas, ke tiu etapo donos fortajn impulsojn a la plua evoluo de la Esperanto-movado en kaj ekster la orientaj landoj. Ni deziras al la libro la meritita disvastiĝon kaj kritikan asimilon. GDREA klopodas helpi al interesuloj havigi al si la libron kaj pro tio akceptas antaŭmendojn. La prezo verŝajne estos por la esperantlingva eldono ĉirkaŭ 20 — 30 markoj.

Detlev Blanke

Movadoj informoj I

Por helpi al la esperantistoj de GDR uzi la novajn eblecojn vojaĝi tutmonden aŭ kunlabori internacie en diversaj institucioj, do finfine plene utiligi sian esperantistecon, „der esperantist" lanĉas novan serion pri la internacia Esperanto-movado. Ni opinias, ke la esperantistoj de GDR deziras jam nun orientiĝi pri tiuj faktoj, eĉ se la necesaj bazaj dokumentoj (jarlibro, internaciaj revuoj) ankoraŭ ne akireblas por ĉiu.

1. Universala Esperanto-Asocio (UEA)

1.1. **Centra Oficejo [CO]:** Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Direktoro: Neil Salvesen. (†)
Telefono: (010) 436 10 44/436 15 39. Telekso: 23721 uea nl, telefakso: 4361751.
Telegramadreso: ESPERANTO ROTERDAM.
Bankoj:
— Bank Mees & Hope NV, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam; konto 25.52.89.804.
— Amro Bank, Postbus 949, 3000 DD Rotterdam; konto: 42.60.51.599.
Poŝtĉekkontoj: a) Nederlando: 378964 de ĝiroficejo Den Haag; b) Svedujo: 74374-0; c) Svislando 12-2310-0.
Laborkampoj: en la CO oni redaktas la eldonajojn de la Asocio (revuo Esperanto, Jarlibro, Katalogo, libroj ktp.). Tie estas komputile administrataj la adresaroj kaj kontoj de UEA. La CO pretigas la ekspedojn de la menciitaj periodajoj kaj de la junulara revuo Kontakto, „Esperanto-dokumentoj", la bultenoj „UN kaj ni", „TEJO-tutmonde", diversaj cirkuleroj, libroj ktp. Ankaŭ la tuta administrado okazas en la CO, same kiel multaj grafikaj kaj aliaj administraj laboroj. La Libroservo kaj Biblioteko troviĝas en la CO. La CO kunlaboras kun komitatanoj, estraranoj kaj diversaj komisiitoj de la Asocio.
Libroservo: la libroservo en la CO estas la plej granda Esperanta libroservo en la mondo. Krom libroj, ĝi vendas ankaŭ diskojn, kasedojn, fotokopiitajn verkojn, insignojn, glŭmarkojn, filatelajojn ktp. kaj peras abonojn al revuoj. La detala katalogo estas senpage sendata al ĉiu individua membro de UEA, kaj al aliaj klientoj de la Libroservo.
Biblioteko: La biblioteko „Hector Hodler" fondiĝis en 1908 kaj nun okupas tri ĉambrojn de la domo. Ĝi estas unu el la plej grandaj Esperanto-bibliotekoj en la mondo, kun pli ol 13 000 volumoj kaj ampleksa kolekto de periodajoj. La materialo ne estas pruntebla, sed oni rajtas uzi ĝin surloke aŭ mendi fotokopiojn.

1.2. **Estraro:** prof. d-ro John Wells (Britio, prezidanto), d-ro Ulrich Lins (FRG, vicprezidanto), prof. d-ro So Gilsu (Korea Respubliko, vicprezidanto), Osmo Buller (Finnlando, ĝenerala sekretario), Spomenka Štimeć (Jugoslavio), Grégoire Maertens (Belgio), Oszkár Princz (Hungario), Ivo Durwael (Belgio).

1.3. Oficejo por rilatoj kun UN

777 United Nations Plaza, New York, NY 10017, Usono. Telefono: (212) 687-7041. Ĉi tiu oficejo prizorgas la rilatojn inter UEA kaj Unuiĝintaj Nacioj. Ekde 1981 UEA havas senperajn formalajn rilatojn kun la Ekonomia kaj Socia Konsilio (EKOSOK) de UN (antaŭe tiuj rilatoj dependis de la konsultaj rilatoj kun Unesko). UEA estas regule reprezentata en la ĉefaj kunsidoj kaj aliaj aktivadoj de la Konsilio. Ĝi ankaŭ estas membro de la Konferenco de Neregistaraj Organizoj ĉe EKOSOK.
La oficejo regule informas la anojn de la sekretariato de UN, la diverslandajn misiojn ĉe UN kaj la neregistarajn organizojn, pri Esperanto kaj pri lingvaj problemoj. Ĉiujare, ĝi kunlaboras kun la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-problemo [CED] por okazigi konferencon. Gravaj anoj de la sekretariato de UN kaj lingvistikaj specialistoj kutime partoprenas en la konferencoj. Kunlabore kun la Esperanto-klubo ĉe UN, ĝi organizas kursojn pri Esperanto. Per sia aktivado kun la Fako de UN pri Publika Informado, la oficejo laboras por informi la anojn de UEA pri la agado de UN kaj por aperigi dokumentojn en la Internacia Lingvo.
Tiuj, kiuj deziras helpi la agadon de la Oficejo, povas aliĝi al la Societo de Amikoj de la Oficejo.

1.4. Instancoj de UEA

Ĉiuj laŭ la adreso de la Centra Oficejo de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL—3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

1.4.1. Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la monda lingvo-problemo (CED)

Agado: esplorado kaj dokumentado pri ĉiaj problemoj en la internaciaj kaj interŝtataj rilatoj, pri la ebloj, metodoj kaj servoj de plurlanda kaj mondskala lingvoplanado, pri esperantologio kun ties lingvistikaj kaj sociologiaj aspektoj.

1.4.2. Institucio Hodler '68
Agado: jure memstare sed sub la kontrolo de UEA, ĝi amasigas kaj investas kapitalon — parte pruntedonitan —, kies renton ĝi utiligas por apogi UEA kaj aliajn movadajn instancojn. Institucio Hodler asignas subvenciojn al la plej bezonaj instancoj en la Esperanto-movado; ĝi disdonis entute pli ol 100 000 gld.

14.3. Terminologia Esperanto-Centro (TEC)
Agado: plibonigo kaj unuecigo de terminologia laboro en Esperanto; studado de rezultoj de internacia terminologi-normiga agado; ilia adapto al bezonoj de Esperanto kaj diskonigo de rilataj scioj; organizado de aproba procedo, inkluzive la lingvan kontrolon kaj finan aprobon fare de la Akademio de Esperanto; eldonado de normaj dokumentoj, precipe terminaraj, kaj iliaj reviziado; reprezentado de Esperanto en naciaj kaj internaciaj terminologiaj kaj normigaj institucioj.

1.5. Institucioj ligitaj al (aŭ kunlaborantaj kun) UEA

1.5.1. Akademio de Esperanto:
p/a prezidanto, D-ro André Albault, 21 rue de Verfeil, F-31200 Toulouse. Francio.

1.5.2. Internacia Scienca Akademio Comenius:
p/a vicprezidanto, Prof. D-ro Stojan Ĝuĝev, bul. Ruskii 33, BG-1504 Sofia, Bulgarujo.

1.5.3. Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS):
Kleinenberber Weg 16b, D-4790 Paderborn, FR Germanujo; tel.: 0049-0-5251-64200.

1.5.4. Akademia Centro Interlingvistika (ACI):
Rada Naczelna ZSP, Ordynacka 9, PL-00-950 Warszawa, Pollando.

1.5.5. Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI):
str. Progrès 33, CH-2300 La Chaux-de-Fonds, Svislando; tel.: (039) 2846 12.

1.5.6. Esperanto-Fondajo Kortrijk:
Leiestraat 30, B-8500 Kortrijk, Belgujo.

1.5.7. Eŭropa Esperanto-Centro (EEC):
Schotlandstr. 73, rue d'Ecosse 73, 1060 Brussel/Bruxelles, Belgujo; tel.: (02) 513 59 95.

1.5.8. Eŭropa Esperanto-Unio (EEU):
Schotlandstr. 73, rue d'Ecosse 73, 1060 Brussel/Bruxelles, Belgujo; tel.: (02) 513 59 95.

1.5.9. Grafika Centro Antverpeno (GCA):
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgujo; tel.: (03) 234 34 00.

1.5.10. Internacia Esperanto-Instituto (IEI):
Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando; tel.: (070) 55 66 77.

1.5.11. Internacia Esperanto-Muzeo (IEMW):
Hofburg, A-1010 Wien 1, Aŭstrujo; tel.: (0222) 52 10 415.

1.5.12. Kultura Centro Esperantista (KCE):
Pf. 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando; tel.: (039) 26 74 07.

1.5.13. Someraj Universitataj Kursoj (SUK):
BP 62, Liège X, Belgio.

1.6. Belartaj konkursoj
La Belartaj Konkursoj de UEA celas evoluigi la artojn, en kaj pere de la Internacia Lingvo. Ili okazas en la Universalaj Kongresoj, sub aŭspicio de UEA. Rajtas konkursi ĉiu esperantisto.
Branĉoj: 1. Originala poezio; 2. Originala prozo; 3. Premio Luigi Minnaja, por eseo pli ampleksa; 4. Originala teatraĵo; 5. Kanto; 6. Fotografio; 7. Infana Literaturo.
Premioj por branĉoj 1, 2, 4 kaj 6: unua 280 gld; dua 196 gld; tria 112 gld; Nova Talento 196 gld.
La nomo de la Nova Talento aperas sur la pokalo „Henry Harabagiu". En la tria branĉo, Premio Luigi Minnaja, estas aljuĝata unu premio, kies valoro estas la jara rento de 4000 gld.
En la kvina branĉo estas aljuĝata unu premio de 280 gld, Premio An-okin pri Kanto.
La branĉo Infana Literaturo proponas premion de 588 gld. al tiu eldonejo, kiu en la antaŭa jaro eldonis la plej elstaran infanlibron.
Regulo: konkursajoj por la branĉoj 1 — 5 devas esti sendataj en po 4 ekzempleroj al la sekretario. Por la branĉo 5 oni sendu muziknotojn kun teksto. Tiuj konkursajoj alvenu ĝis la 31a de marto de la koncerna jaro. Laŭeble, oni aldonu 5 irk. por ĉiu branĉo en kiu oni konkursas.
Konkursajoj por branĉo 6 estu sendataj en unu ekzemplero al „Fotokonkurso", p/a la LKK de la koncerna Universala Kongreso, por alveni ĝis la 1a de julio. La fotoj estu teme ligitaj al la Internacia Lingvo aŭ al la kongresa temo.
Por branĉo 6, Infana Literaturo, oni sendu tri ekzemplerojn de da libro al la CO ĝis la 31a de marto.
La regularo de la Belartaj Konkursoj estas senpage ricevebla de la CO de UEA.

1.7. Geonkloj esperantistoj:
p/a S-ro W. H. Simcock, Clayton House, Butterton, Leek, Staffs, Britujo ST13 7SSR; tel. (05388) 240.
Geonkloj Esperantistaj estas skemo por helpi junajn esperantistojn ĝis 16-jaraj per kunligado koresponda kun plenkreskuloj. Oni volonte sendos pliajn informojn, kaj danke akceptos mondonacojn (uea-konto onkl-f) por helpi la servon.

1.8. Kastora klubo de Esperanto:
ul. Klonowa 18, Pl-00-591 Warszawa, Pollando. Ĝi estas internacia klubo de Esperanto por infanoj kaj gejunuloj ĝis la aĝo de 18, ĝia ĉefa celo estas instigi ilin uzi la Internacian Lingvon kaj labori por la lingvo kaj ties idealoj. La Klubo havas sian Korespondan Servon.

1.9. Koresponda Servo Mondskala:
p/a S-ro Robert Llorens, „Les Hortensias 2", 121 bis Boulevard Napoléon III, F-06200 Nice, Francujo.

1. Ĉiu persono, kiu deziras rekte ricevi adreson de KSM, devas aldoni du internaciajn respondkuponojn aŭ samvalorajn francajn poŝtmarkojn, aŭ ĝiri unu usonan dolaron al la poŝtkonto apartenanta al KSM, sed sub la nomo de la komisiito Robert Llorens, poŝtkonto Marseille 7 829-40.L.

2. Por lernejanoj:

A. Kolektiva klaskorespondado:
Necesas liveri la jenajn detalojn: nomo kaj adreso de lernejo; nomo de la respondeca E-instruisto, aĝo, sekso de la klasanoj; kun kiuj oni volas korespondi; kiom longe validas la korespondpeto; apartaj rimarkoj.

B. Individua korespondado sub gvidado de E-instruist(in)o:

Necesas liveri la jenajn detalojn: nomo kaj adreso de la lernejo; nomo de la respondeca E-instruist(in)o; listo de la gelernantoj; kiuj deziras korespondi — nomo; antaŭnomo; adreso hejma; sekso; aĝoj ĉefaj interesoj; grado de E-scio; kun kiuj landoj; kiom longe validas la korespondpeto; apartaj rimarkoj.

1.10. Magnetofona Servo:
p/a Rüdiger Eichholz (komisiito), R. R. I., Bailieboro, Ontario, Kanado KOL 1BO; tel. (705) 939-6088.
Agado: kolektado de sonbende registritaj prelegoj, radio-dissendoj, kantoj, kursoj, teatrajoj kaj ĝenerale interesaj sondokumentoj, en aŭ pri Esperanto. Vendado de kopioj de tiuj programoj. Ĉiu sendinto, kies programo estas akceptita, rajtas ricevi senkoste programojn ĝis la duobla tempodaŭro de la akceptitaj surbendigoj. La Magnetofona Servo liveras nur kontraŭ antaŭpago de la kostoj aŭ al la germana poŝtĉekkonto de R. Eichholz, Bailieboro, Ontario, Kanado, Hannover 1173 68-306, aŭ al la konto de R. Eichholz en la CO de UEA, uea-kodo espp-w, aŭ rekte al: R. Eichholz, R. R. I., Bailieboro, Ontario, Kanado, KOL 1BO. Listo de la nun haveblaj programoj de la Magnetofona Servo estas ricevebla kontraŭ afranko ĉe la komisiito.

2. Landaj asocioj de UEA (k. a.):

2.1. — Argentina Esperanto-Ligo:
Santa Fe 497, RA-1708 Morón (BA)
— **Argentina Esperantista Junulara Organizo:**
Viamonte 75, 2000 Rosalia, Pcia de Santa Fe.

2.2. — Aŭstralia Esperanto-Asocio:
G. P. O. Box 313, Sunnybank, Queensland 4109
Organo: The Australian Esperantist, 17 Harrison Street, Willagee, WA 6156. Red: d-ro D. Broadribb.

2.3. — Aŭstria Esperantista Federacio:
Fünfhausgasse 16-18, A-1150 Wien, telefono: (0222) 83 44 75.
Organo: Aŭstria Esperanto-Revuo kaj Esperanto-Servo.
— **Aŭstria Esperanto-Movado:** p. k. 156, Batthyanystiege, Hofburg, A-1014 Wien, telefono: (0222) 52 10 41 5.
Organo: Esperanto aktuell.
— **Aŭstria Esperanto-Junularo:** P. F. 804, 8011 Graz.

2.4. — Belga Esperanto-Federacio:
Schotlandstr. 73, B-1060 Bruselo, telefono: (02) 53 87 166.
— **Association pour l'Espéranto:** rue des Glacières 16, B-6001-Marcinelle, telefono: (071) 431413.
— **Flandra Esperanto-Ligo:** Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, telefono: (03) 234 3400.
— **Flandra Esperantista Junulara Asocio:** Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, telefono: (03) 234 34 00.
Organoj: JEN . . .; Koncize.

2.5. — Brazila Esperanto-Ligo:
SCS — Ed. Jockey Club — sala 103, 70300 Brasília — DF, kaj Caixa Postal 11-1105, 70084 Brasília — DF; telefono: (061) 226-1298.
Organo: Brazila Esperantisto.
— **Brazila Esperantista Junulara Organizo:** Caixa Postal 2761, BR-01051 Sao Paulo (SP).
Organo: Impulso.

2.6. — Benina Asocio de Esperanto-Amikoj:
ĉe Tchikpe Privas, B. P. 06-1855, Cotonou.

2.7. — Esperanto-Asocio de Britujo:
Esperanto-Centro, 140 Holland Park Avenue, London, W11 4UF; telefono: 01-727 7821;
Organoj: La Brita Esperantisto, Esperanto News,
— **Junularo Esperantista Brita:** Esperanto-Centro, 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF

2.8. — Bulgara Esperantista Asocio:
Bul. Hristo Botev 97, BG-1303 Sofia, telefono: 310029, 3240 68.
Organo: Bulgara Esperantisto
— **Bulgara Esperanto-Junularo:** p/a BEA

2.9. — Ĉeha Esperanto-Asocio:
Jilská 10, CS-110 01 Praha 1; Telefono: (2) 22 02 62
Organo: Starto
Junulara Sekcio de Ĉeha Esperanto-Asocio:
Jilská 10, CS-110 00 Praha 1.

2.10. — Slovakia Esperanto-Asocio:
Sobotské nám. 6, CS-058 01 Poprad; Telefono: (92) 235 39/324 19
Organo: Esperantisto Slovaka
— **Junaj Esperantistoj en Slovakio:** Sobotské nám. 6, CS-058 01 Poprad.

2.11. — Ĉilia Esperanto-Asocio:
Casilla 13828, Santiago-21.
Organo: Informa Letero.

2.12. — Ĉina Esperanto-Ligo:
P. O. Kesto 825, Beijing (Pekino); telefono 89 63 46.
Organoj: El Popola Ĉinio, La Mondo.

2.13. — Dana Esperanto-Asocio:
Skellet 12, DK-6000 Kolding.
Organo: Internaj informoj.

2.14. — Eburborda Esperanto-Asocio:
09 B. P. 1471 Abidjan 9.

2.15. — Unuiĝo Franca por Esperanto:
4bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris, telefono (1) 42 78 68 86.
Organo: Franca Esperantisto
— **Junulara Esperantista Franca Organizo:** JEFO, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris.
Organoj: Jefo informas, Koncize.

2.16. — Esperanto-Asocio de Finnlando:
Pengerkatu 18 A 86, SF-00500-Helsinki
Telefono: (90) 71 55 38
— **Finnlanda Esperantista Junulara Organizo** p/a EAF.
Organo: Kvinpinto

2.17. — Germana Esperanto-Asocio:
Lambertstr. 12, D-6430 Bad Hersfeld,
tel. (066 21) 14995.
Organo: Esperanto aktuell.

— **Germana Esperanto-Junularo:** Eifelstr. 9, D-5300 Bonn 1.
Organoj: Koncize, GEJ-gazeto

2.18. — Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, [GDREA]:
Otto-Nuschke-Str. 1, DDR-1080 Berlin; telefono (02) 2 82 63 43.
Organo: der esperantist
La Esperanto-Junularo (GDR): Unter den Linden 36/38, Berlin 1086, telefono 2 23 15 64

2.19. — Helena Esperanto-Asocio:
Agiu Meletiu 54, 112 52 Athina; telefono (01) 86 27 983.
Organo: Nia Verda Informilo
— **Junulara sekcio de HEA:** Agiu Meletiu 54, GR-112 52 Athina.

2.20. — Hindio: Federacio Esperanto de Bharato (FEB):
35/1, Swami Vivekananda Road, Howrah — 711 101.
Organo: Fenestro.

2.21. — Hispana Esperanto-Federacio:
Carreras Candi 34-36, 08028 Barcelona; telefono: (93) 240 2662.
Organo: Boletín
— **Hispana Esperantista Junulara Societo:**
Sol 75, 41003 Sevilla.
Organo: HEJS-Juneco.

2.22. — Hungara Esperanto-Asocio:
pf. 193, H-1368 Budapest. Stratadreso: Szentháromság tér 6, Budapest I; telefono (1) 564-093 kaj (1) 563-659.
Organoj: Budapešta Informilo, Hungara Vivo, Tekintet (hungarlingva revuo), Juna Amiko, Fokuso.
— **Hungara Esperanto-Junularo:** pf. 193, H-1368 Budapest.

2.23. — Irano:
Ĉefdelegito: s-ino J. S. Saheb-Zamani, 46 Azar-shahr, Iran-shahr Shamali,
Teheran 15-846.

2.24. — Esperanto-Asocio de Irlando (EAI):
9 Templeogue Wood, Templeogue, Dublin 12.
Organo: Esperanto en Irlando.

2.25. — Islanda Esperanto-Asocio (IEA):
Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík.
Organo: La velo.

2.26. — Esperanto-Ligo en Israelo:
P. O. K. 1289, IL-61 012 Tel-Aviv.
Organo: Israela Esperantisto.
— **Junulara Esperanto-Ligo Israela:**
P. O. K. 53160, IL-61531 Tel-Aviv.
Telefono (03) 472406.
Organo: JELI-paĝoj en la organo de ELI.

2.27. — Itala Esperanto-Federacio:
Via Villoresi 38, I-20143 Milano; telefono (02) 83 50 857;
Organo: L'Esperanto.
— **Itala Esperantista Junularo:** p/a Francesco Pignatelli, Via del Lavoro 8/A, I-31015 Conegliano Veneto (Treviso); telefono: (0438) 32003.

2.28. — Japana Esperanto-Instituto:
Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, Tôkyô-to, 162; telefono (03) 203-4581.

2.29. — Jugoslavia Esperanto-Ligo (JEL):
Terazije 42, YU-11000 Beograd; telefono (011) 687-528, Administrejo: ĉe la sekretario, Dj. Dragojlovič, Aleja M. Tita 3, III ul. st. 11, YU-24000 Subotica; telefono (024) 29-537.
Organo: Jugoslavia Stelo.

— **Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio:** samaj adresoj kiel JEL.
Organo: Esperbih.

2.30. — Kanada Esperanto-Asocio:
C. P. 126, succ. Beaubin, Montréal Québec, H2G 3C8.
Organoj: Lumo, Alumeto.
— **Junularo Esperantista Kanada:** samadrese kiel KEA.
Organo: JEK-paĝo en Alumeto.

2.31. — Kolombia Esperanto-Ligo:
a/a de la sekretario: María Victoria Carvajal, Apartado Aéreo 35-12, Bogotá 1.

2.32. — Korea Esperanto-Asocio:
C.P.O. Kesto 4258, Seoul-100-642, telefono (02) 734-6222.
Organo: La lanterno azia.
— **Korea Esperanto-Junularo:** C.P.O. Kesto 4258, Seoul-100.

2.33. — Kuba Esperanto-Asocio:
Apartado postal 2018, La Habana 2, Provincia Ciudad de La Habana. Stratadreso: Neptuno 201; telefono 61-0576.

2.34. — Libana Esperanto-Instituto (Asocio):
P.O.Box 90-931, Jdeideh.

2.35. — Luksemburga Esperanto-Asocio:
1, rue de Kehlen, L,8394, Olm;
telefono: 30 96 15.
Organo: LEA-informilo.

2.36. — Malagasa Esperanto-Asocio:
Vata Paositaly: 3420, Antananarivo-101.
— **Junulara Esperantista Organizo de Madagaskaro:** Vata Paositaly: 3420, Antananarivo-101.

2.37. — Esperanto-Societo (Malta):
P.O.Box 142, Valletta.
Organo: Mezmara Stelo.

2.38. — Meksikia Esperanto-Federacio:
Ap. Postal 10576, México DF 06000.
Organo: Ni ĉiuj.

2.39. — Mongola Esperanto-Unuiĝo:
poŝtkesto 733, Ulan-Bator.

2.40. — Nederlanda Esperanto-Asocio:
Esperanto-domo, Riouwstraat 172, 2585 HW Den Haag; telefono (070) 55 66 77.
Organo: Komuna Esperanto-Gazeto (kun aliaj nederlandaj asocioj).
— **Federacio de Esperanto-Organizoj en Nederlando (F.E.N.):** Hankemaborg 36, 7608 DH Almelo.
Organo: Komuna Esperanto-Gazeto.
— **Nederlanda Esperanta Junularo:** Nolenslaan 74-II, 3515-VL-Utrecht; telefono (030) 734520.
Organo: JEN . . .

2.41. — Nikaragva Esperanto-Asocio:
Aptdo. 3912, Managua 5.

2.42. — Norvega Esperantista Ligo, NEL:
Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo 5;
(02) 3508 94.
Organo: Norvega Esperantisto.
— **Norvega Junularo Esperantista, NJE:**
Olaf Schousv. 18. N-0572 Oslo 5.
Organo: Kvinpinto.

2.43. — Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, NZEA:
P.O.Box 330, Wellington 1.
Organo: Nov-Zelanda Esperantisto

2.44. — Pakistana Esperanto-Asocio (PakEsA):
P.O.Kesto 535, Multan-60000.
Organo: Esperanto.

— **Pakistana Esperantista Junulara Organizo:** Majidia Maktab, Baba Karam Shah, Jhelum.
— **Pakistana Studenta Esperanta Ligo (PaSELo):** 1184, Last Bus Stop, Islamapura, Lahore.

2.45. — Perua Esperanto-Asocio:
Ap. 23, Lima 18, stratadreso: Av. Bolivia 211, 3a etaĝo, Lima.

2.46. — Pola Esperanto-Asocio:
ul. Krucza 38/42 PL-00-512 Warszawa 1; tel. (22) 21 51 33 kaj (22) 28 28 82.
Organoj: Informator Wewnetrzny Pzc. Pola Esperantisto
— **Pola Esperanto-Junularo:** p/a PEA.
— **Pola Studenta Esperanto-Komitato (PSEK):** ul. Ordynacka 9 ,PL-00-950 Warszawa; tel. (22) 26 40 58.

2.47. — Portugala Esperanto-Asocio (PEA):
Rua Dr. João Couto, 6, r/cA, A-1500 Lisboa; tel. (01) 714 13 59.
Organo: Nia Bulteno, Revista Portuguesa de Esperanto.

2.48. — Rumana. Esperanto-Asocio:
C.P. 1-304 Bucuresti 1.

2.49. — Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU):
provizora adreso: Vladimir Samodai, „Moscow News", ul. Gorkogo 16/2, 103829, GSP, Moskva.

2.50. — Litova Esperanto-Asocio:
ab.k. 167, 233000 Kaunas-C.

2.51. — Latva Esperanto-Asocio:
Gorkija iela 11a, 226000 Riga.

2.52. — Esperanto-Asocio de Estonio:
Olevimägi 12/14, 200101 Tallinn.
(Aliaj sovetiaj adresoj: vidu „de" 4/89)

2.53. — Esperanto-Centro Srilanka:
71, Pagoda Para, Nugegoda (Distrikto Kolombo); tel. 5521 85.

2.54. — Sud-Afrika Esperanto-Asocio (SAEA):
75 Bronkhorst St., Groenkloof 0181.
Organo: Bona Espero.

2.55. — Sveda Esperanto-Federacio (SEF):
Brunnsgatan 21, S-111 38 Stockholm; tel. (08) 11 74 34.
Organo: La Espero
— **Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo:**
Brunnsgatan 21, S-111 38 Stockholm;
tel. (08) 111 74 34.
Organo: Kvinpinto.

2.56. — Svisa Esperanto-Societo:
Zumhofstrasse 22, CH-6010 Kriens LU; tel. (041) 45 55 83.
Organo: Svisa Esperanto-Revuo
— **Junularo Esperantista Svislanda:**
C.P. 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds.

2.57. — Tajlanda Esperanto-Instituto:
G.P.O. Box 1846, Bangkok.

2.58. — Togolando: Klubo „Nova Sento":
Gbeglo Koffi, B.P. 13169. Lomé.

2.59 — Turka Esperantista Asocio (TEA):
p.k. 54, Üsküdar/Istanbul. Stratadreso: Akin Sokaĝi 18, D-7, Suadiye, Istanbul;
tel. 350 21 76.
Organo: Novajoj el Esperanto-Asocio.

2.60. — Urugvaja Esperanto-Societo (UES):
Casilla de Correo 1040, Montevideo.

2.61. — Esperanto-Ligo por Norda Ameriko (ELNA):
P.O.Box 1129, El Cerrito, CA 94530; tel. (415) 653-0998.
Organo: ELNA Newsletter
Usona Esperantista Junulara (USEJ):
provizore p/a. ELNA.

2.62. — Venezuela Esperanto-Asocio (VEA):
Apartado 47675, Caracas 1041 A; tel. (02) 662-2245.
Organo: Venezuela stelo

2.63. — Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio:
105A Quan Thanh Strato, Hanoi.
Organo: La vjetnama esperantisto.

2.64. — Esperanto-Instituto de Zairio:
p/a Nduantoni-Bakidila Ngangu, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaire).
[En la dua parto de la serio (4/90) vi trovos:
— Esperanta gazetaro,
— ĉiujaraj, tradiciaj Esperanto-aranĝoj.]

Budapeŝta Informilo

plene ŝanĝiĝis ekde la 1-a de januaro 1990. La nova formato estas A/4, la baza amplekso 8 paĝoj (interne povas aperigi plusajn aldonajn paĝojn ĉiuj fakaj aŭ aliaj organizaĵoj kontraŭ la kovro de la rektaj kostoj), ĝi aperos 24 fojojn en la jaro. Ni certigas 15tagan informtransigon (enkalkulante 5 tagojn ankaŭ por la poŝto). La abonkotizo por okcidento ne ŝanĝiĝas. Por aliaj lando ĝi varias laŭ aparta interkonsento, t. e. ke la kotizo por ili altiĝas.
Ni volas ke ni estu kiel eble plej internacia. Ni volas fariĝi „servo-gazeto"; informi pri ĉio, kio aktivigas la homojn. Tial ni petas Vin, se iujn informojn — pro tempo — aŭ spacomanko

Vi ne povos aperigi — bonvolu ilin sendi al ni.
Nia gazeto daŭrigos siajn ĝisnunajn senpagajn servojn: koresponda rubriko, Esperanto en laborejojn, metiejoj de Esperanto, informado pri aranĝoj ktp. Ni pretas fari specialan varbkampanjon por la opaj aranĝoj — organizantoj kontaktu rekte nian redakcion.
Ni aparte proponas por Vi reciprokan „gastigadon" de niaj gazetoj, t. e. ni volonte aperigos pri Via gazeto informojn en la amplekso de 3 000 literoj + ilustraĵoj, se ankaŭ Vi pretos fari la samon.

El letero de Imre Szabó,
redaktoro de Budapeŝta Informilo

„Budapeŝta Informilo" estas abonebla en GDR ĉe: Zentralvertrieb des PZV, Uebigauer Str. 4, Falkenberg, 7900. Ne forgesu indiki: Best.-Nr. Z 0133-0977.

12-a renkontiĝo de eks-LEA-anoj

Denove renkontiĝis la iamaj membroj de Germana Laborista Esperanto-Asocio. Estis ĉi-foje nur 25, kiuj kunestis de 29-a ĝis 31-a de januaro 1990 en Bad Saarow. En 1989 ne okazis renkontiĝo. En la jaro 1990 la esperantistoj ekzistas oficiale en Kulturligo 25 jarojn. Tio estis bonvena okazo por la sekretario prezenti 8 etapojn de la esperantista agado sur la teritorio de GDR, ekde 1945 ĝis nun. Krom tio li prezentis la libron de Ulrich Lins „La danĝera lingvo". Sen iu ajn dubo, la amasigita materialo en ĉi tiu libro devigas nin rekonsideri kelkajn aspektojn de la laboristesperantista historio, la prezento de la nuna situacio de GDREA kaj ĝia eventuala estonteco tuj rezultigis 3 mondonacojn. Ankaŭ ĉi-foje ne mankis lumbildparoladetoj kaj rememoroj de niaj veteranoj. Tamen — ne pensu, ke nur temis pri nostalgiaj rememoroj. La nuno fakte estis la ĉefa temo, kaj tio estis komprenebla.

D B.

Dankon pro mondonacoj!

Al nia alvoko en „de" 1/90 venis multaj reagoj. Sub tiu ĉi rubriko ni estonte kvitancos la ricevitajn mondonacojn. Nur se la donacinto klare esprimas al la redakcio, ke oni ne menciu lian/ŝian nomon, ni listigas la sumon kiel anoniman donacon.

Jen la unuaj donacoj:

Friedel Greif: 5000,—
Rudolf Eichler: 3000,—
anonime: 6000,—
Ludwig Schödl: 500,—
Rudi Weiß: 50,—
Gerda Häusler: 100,—
Ludmilla Hypius: 100,—
Friedel Bärsch: 1000,—
Matthias Reimann: 15,—
D-ro Till Dahlenburg: 100,—
familio Esefeld: 50,—
Karl Kraus: 500,—
Alfred Schulze: 20,—
Friedrich Krake: 50,—
A. W. el H.: 100,—
Kurt Daßler: 20,—
Alfred Baumgart: 15,—
Berta Ehmig: 100,—
Alois Streichbier: 20,—
Paul Lotter: 100,—
Ulf Beling: 100,—
Ruth Partecke: 100,—
B. Sch. el T.: 50,—
Max Conrad: 100,—
Franz Genz: 50,—
Walter Schuster: 100,—
Werner Grebhahn: 30,—
Ernst Lindner: 100,—
Robert Heinze: 50,—
Fritz Köcher: 500,—
Irene Sosnoski: 50,—
M. J. el St.: 100,—
Rudi Bock: 100,—
Karin Gräwe: 20,—
Kurt Held: 90,—
Dr. J. Rohde: 20,—
Dr. P. Ruff: 100,—
Werner Habicht: 100,—
Hartmut Mittag: 20,—

Sume (19. 4. 1990) 18620,—
Koregan dankon al la donacintoj!

[resto de p. 37]

4. Oni akceptis tute novan statuton, kiu i. a. donas al la asocioj kaj societoj en KL tre altan memstarecon kaj memrespondecon. La kulturliga tegmento mem funkcios kiel ŝirmilo kaj helpilo dum la ekonomie tre komplika evoluo en GDR.
5. Kulturbund der DDR fariĝis „Kulturbund e. V.", t. e. Kulturligo r(registrita) s(ocieto).

Flanke de GDREA partoprenis 7 oficialaj delegitoj. La prezidanto de la asocio eniris la Ĉefan Estraron de KL. Pli da informoj en „de" 4/90.

GDR

37j. matematikisto dez. kor. pri muziko, matematiko, E.-movado, turismo kantado: d-ro Rainer Nitsche, E.-Thälmann-Str. 13, **Merseburg, 4200.**

21j. studentino dez. kor. pri naturprotektado, vojaĝoj, geografio, scienc-populara literaturo, arto, lumbildoj: Sylvia Siebert, Gartenstadt 139, **Halberstadt, 3600.**

Jan Clasen, Pestalozzistr. 2, **Zwenkau, 7114,** dez. kor. pri ĉiutagaj problemoj kaj komputiloj.

Astrid Majora (18j.) dez. kor. pri vojaĝoj, landoj (pk., pm.), literaturo, muziko. H.-Beimler-Str. 5, **Waren, 2060.**

30j. fervojisto dez. kor. tutmonde pri turismo, vivmanieroj en div. landoj, fotografado, lingvoj, brodajo: Michael Petters, Bahnhofstr. 2, **Wilthen, 8609.**

Corinna Städtner, K.-Marx-Str. 52, **Wiederitzsch, 7145,** (18j.) dez. kor. p. ĉ. t. de vivo.

Mi dez. kor. pri literaturo, fotografaĵoj, E.-movado, Sabine Protze, Müller-Berset-Str. 1, **Dresden, 8019.**

Petra Simon, 20j., dez. kor. pri naturo, astronomio, lingvoj, literaturo, bildkartoj. Adr.: H.-Beimler.Str. 12, **Magdeburg, 3035.**

Komencantoj el distrikto Karl-Marx-Stadt:

— Heinz Poller (nask. 24. 12. 1952), inĝ., Paul-Strößner-Str. 12, **Aue, 9400.**

— Manuela Tuchscherer (23. 9. 1972), lernantino, W.-Ulbricht-Str. 42, **Schwarzenberg, 9430.**

— Anja Böttcher (13. 8. 1974), lernantino, K.-Kollwitz-Str. 5, **Schwarzenberg, 9430,**

— Sabine Finster (10. 9. 1974), lernantino, W.-Pieck-Ring 14, **Schwarzenberg, 9430,**

— Lusanne Schramm (30. 1. 1975), lernantino, W.-Pieck-Ring 8, **Schwarzenberg, 9430.**

— Ronny Biesel (31. 1. 1975), W.-Pieck-Ring 34, **Schwarzenberg, 9430,**

— Walter Trommler (2. 2. 1918), pensiulo, Untere Schloßstr. 11, **Schwarzenberg, 9430.**

S-ro Frank Staffeldt, Kastanienallee 1, **Berlin, 1150,** dez. kor. pri literaturo, mikrokomputiloj.

52j., komencanto, dez. kor. tutmonde pri vivo en aliaj landoj, Esperanto, turismo, literaturo: Peter Weinmeister, E.-Thälmann-Str. 101, **Schöneiche, 1254.**

S-ro Marco Voit, E.-Thälmann-Str. 114, **Teltow, 1530,** dez. kor. pri politiko, muziko, ŝako, literaturo, E.-movado.

Verena Blum, 13j., lernantino, dez. kor. pri basketbalo, bestoj, naturprotektado, indianoj. Adreso: Friesacker Str. 2a, **Rhinow, 1833.**

Komencanto, 42j. instruisto, dez. kor. pri lingvoj, literaturo, ĝardeno: Berndt Lange, Hartmannstr. 16, Pf. 381-34, **Plauen, 9900.**

15j. komencantino dez. kor. tutmonde pri muziko, literaturo, lingvoj: Karen Hübner, Dorfstr. 28, **Locktow, 1821.**

30j. komencanto dez. kor. pri politiko, diskoj, lingvoj: Klaus-Dieter Scholz, Psf. 2078, **Erfurt, 5060.**

Komencanto, 46j., ŝaltmajstro, dez. kor. tutmonde pri ĉiutaga vivo, turismo: Friedrich-Karl Hartmann, Grabenmühlenweg 9, **Nebra, 4820.**

Herausgeber: Kulturbund e.V.

Redaktion: Otto-Nuschke-Str. 1, Berlin, 1080

Fernruf: 2 82 63 43

Verantw. Redakteur: Dr. sc. Detlev Blanke.

Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Joachim Schulze. —

Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. —

Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.

Druck: Druckerei Aue, Aue, 9400

Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16